

# LA ONDO de Esperanto

*Internacia sendependa magazino en Esperanto*

Esperanto estas ponto:  
kandidato Dasgupta  
respondas al *La Ondo*

Pollando gastigos la  
festan UKon en 2009

Moskva konferenco je  
akademia nivelo

Slovaka vicĉefministro  
por vera lingvopolitiko

Wolfgang Kirschstein  
pri la kopenhaga domo

La Sukcena Lando (8)

Esperanto-muziko sen  
esperantistoj, 3a parto

Estas anoncitaj niaj  
tradiciaj konkursoj



Majo  
2007

№5

# LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2007. №5 (151)

**Aperas** ĉiumonate

**Fondita** en 1909 de Aleksandr Saĥarov

**Refondita** en 1991

**Eldonas kaj administras** Halina Gorecka

**Redaktas** Aleksander Korĵenkov

**Konstantaj kunlaborantoj** Tatjana Auderskaja, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Viktor Kulakov, Glebo Malcev, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloísio Sartorato, Serge Sire, Maria Sokolova

**Adreso** RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

**Telefono** (4012) 656033

**Elektronika poŝto** [sezonoj@kanet.ru](mailto:sezonoj@kanet.ru)

**Hejmpaĝo** <http://Esperanto.Org/Ondo>

**Abontarifo por 2007**

*Internacia tarifo:* 32 eŭroj

*Orienteŭropa tarifo:* 18 eŭroj

*Ruslanda tarifo:* 390 rubloj

*Pollanda tarifo:* 60 zlotoj

*Aerpoŝta aldono:* 5 eŭroj

*Elektronika abono (pdf):* 12 eŭroj por ĉiuj landoj

**Perantoj** vidu la liston sur la paĝo 23 de la februara kajero.

**Konto ĉe UEA** avko-u

**Recenzoj** Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

**Eldonkvanto** 700 ekzempleroj

**Anonctarifo**

*Plena paĝo:* 100 EUR (2000 rubloj)

*Duona paĝo:* 60 EUR (1200 rubloj)

*Kvarona paĝo:* 35 EUR (700 rubloj)

*Okona paĝo:* 20 EUR (400 rubloj)

*Malpligrandaj:* 0,50 EUR aŭ 10 rubloj por 1 cm<sup>2</sup>

Kovrilpaĝa anonco kosta duoble. Triona rabato pro ripeto.

**Donacoj** La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

**Represoj** Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2007.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2007, №5 (151).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горещкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 23 апреля 2007 г.

Цена свободная. Тираж: 700 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

**L**a prezidentaj elektoj en Francio kiel realaĵo, la parlamentaj kaj prezidentaj elektoj en Ruslando kiel drampromesa perspektivo turnas min nevole al tiu dolora kaj negaja temo de krizo de la reprezenta demokratio.



Neniu aludo pri minaco al la respublikaj institucioj en mia patrio, — tiuj estas fakte konstruaĵoj de burokrataro monarĥio nedinastia, kaj en tia kvalito sin gardas sekure de kiu ajn risko de difektiĝo. La reganta klano jam indikis du kandidatojn: “progreseman liberalulon” (vicĉefministro D. Medvedev) kaj “kleran ŝtaton” (vicĉefministro S. Ivanov), kiuj pedante egalfoje aperas antaŭ la popolo sur la ekranoj kaj tute egalbone zorgas pri plej diversaj popolaj bezonoj. Probable iam, iom poste, la klano elektos unu veran kandidaton kaj tiam perfekta ekvilibro de la bonzorgo, bonsaĝo kaj bonmerito rompiĝos bruske kaj fatale. Sed nun preskaŭ skizofrenia perplekso englitas la korojn de la politike reagemaj civitanoj, kiuj komencas sopiri pri la klasika roma respubliko kun ĝiaj du egalrajtaj konsuloj.

La francoj ne riskas tiel forte en la persona miselekto: ilia prezidento ne posedas eĉ dekonon da potenco de la ruslanda. Kompense ili riskas ion perdi kun iu perdo en la meĥanismo de sia reprezenta demokratio. Ĉar nur demagogoj diras, ke pli bone estas havi neniun demokration ol unu tiom ruiniĝan. Ĉiu prudenta civitano devas konsenti, ke eĉ iu kiom ajn ruiniĝa popolarigo pli kosta ol neniu. La francoj havas ion por riski, ili obtenis kaj gardis t.n. socian ŝtaton kaj strebas ĝin ne perdi. Malgraŭ la krizo de la reprezenta mekanismo multo dependas de ilia elekto, kiu signalas la prioritatojn kaj demonstros la kapablon de la mobilizo. Ĝuste tio — lasta — la kapablo de la mobilizo — plej gravas en la prezolisto de la demokratio. Iuokaze la lokon de la misfara respublika aparato okupas sindikato, partio, bloko, kiu ajn organizo — kaj premante en punkto konfronta establas socian bilancon. La socia forto de kapitalo konfrontas la kapitalon de socia forto, kaj la respubliko respiras ekvilibre.

Paradokse, tiu socia elano pezas ankaŭ sur la balanco de nia interna ruslanda politiko, eble eĉ pli ol la segmento interna en la elekto venonta de la nova plentenculo. La potenculoj de nia tipo emas imiti, — kopiemaj, ili sekvas plej modernajn standardojn. Kun certa risko mi povas prognozi: se Francio elektas liberalulon, nia nacia favorito iĝos Medvedev, se gajnas centristo — la popolan fidon rikoltos Ivanov... mi ne povas daŭrigi koncerne la socialiston, — nia klanpropono ne havas tiun koloron en sia spektro.

**Alen Kris**

**La kovrilpaĝa foto** bonvenigas anglalingve du novajn landojn al la Eŭropa Unio. Du pliaj landoj aldoniĝis al tiuj 23 kontinentaj EU-landoj, kiuj ĉiujare pagas plurmiliardan tributon al iuj du insulaj ŝtatoj. Ĉu alia solvo estas ebla?.. La slovaka vicĉefministro Ĉaplovič pensas, ke *jes*. Legu pli detale en la 11a paĝo.

# Esperanta estas punta

## Probal Dasgupta respondas

Probal Dasgupta, la sola kandidato por la prezidanteco en UEA, naskiĝis 19 sep 1953 en Kolkato (Barato), doktoriĝis en Nov-Jorka Universitato pri la genera sintakso de sia gepatra lingvo, la bengala. Honora membro de la Lingvistika Societo de Usono ekde 2004, li instruis la lingvistikon en tri barataj universitatoj. En la universitato de Hajderabado li estis direktoro (2000–06) de tiu “Programo por Studi Baraton” por fremdaj studentoj, kiu sub li iĝis tutlande konata pioniraĵo pontofaranta inter eŭropaj/usonaj gejunuloj kaj la barata universitata medio. En tiu universitato li estis la dekanato pri humanistiko (2001–04).

Ekde aŭgusto 2006 Dasgupta entreprenas en la Barata Statistika Instituto (en Kolkato) leksikajn esplorojn. Esperanto rolas en tiu laboro kiel interleksika glosilo ebliganta novtipan, pedagogie utilan kartografion de la vortokono. Aperis el lia plumo pli ol dek libroj kaj pli ol tricent artikoloj en la bengala, la angla, la franca kaj Esperanto.

En Esperantujo li estas konata kiel verkisto, tradukisto kaj kritikisto. Membro de la Akademio ekde 1983, li iĝis ĝia vicprezidanto en 2001. Al la movada vivo li kontribuas ekde la rejkvavika UK en 1977. Li servis kiel volontulo de UEA (1980), kaj kiel komitatano (1983–86). En UK-oj li estis trifoje reĝisoro de la kongresa temo. Iama prezidanto de sia landa asocio (1987–89) — kiun li kunfondis en 1982 — li nun estas la prezidanto de la Internacia Ekzamena Komisiono.

Probal Dasgupta volonte konsentis doni sian unuan kandidat-intervjuon al *La Ondo*.

**Ĉiu kandidato devas deklari sian movadan programon. Kion vi proponis?**

Se mi elektiĝos prezidanto de UEA, mi strebos atingi daŭripovajn agordojn bazitajn sur la realaĵoj de la reta epoko. Tio por mi signifas ne nur trovi utilajn aranĝojn por tiuj, kiuj nun lernas Esperanton rete kaj volas funkcii tiuspace sen tradiciaj asociaj kotizoj, kvankam tio ja restas ŝlosila celo. Mi volas konstrui movadon, kie la tradiciaj membroj, kroĉitaj al eventuale ne tre

ĝisdataj ideoj pri Esperanto kaj pri la funkciado, ne sentos sin ekskluzivataj. Por efektiviĝi tian programon, mi laboros kun aliaj esperantistoj, kiuj volas pontofari rilate diversajn breĉojn kaj polusiĝojn ekestintajn en la ĵusaj jardekoj, kaj ekestintajn ne nur en la mikromondo Esperanta.

**Tre bone por program-deklaro, sed bonvolu iom detaligi...**

Se la fotarto forprenas la portretan funkcion de la pentrarto, tio ne signifas, ke oni ĉesos pentri. Tio signifas, ke oni reinventas la celojn de la pentrado. Simile, se ial sufiĉe multaj homoj ja uzos la anglan por grandegskalaj interligaj celoj, tio ne signifas, ke ĉiuj ĉesos uzi Esperanton, sed ke ni devos reinventi la celojn de Esperanto.

**Kio do estas Esperanto en ĉi tiu aspekto?**

Esperanto estas io streba — kiel la remado, kiel la biciklado — kaj rekte engaĝas la povojn kaj ŝatojn de la individuoj, kiuj esperantumas. Kiel Claude Piron delongege emfazadis, Esperanto estas lingvo bona por nia persona sano kaj feliĉo.

Ni do devus povi prezenti ĝin — ne nur al “la eksteruloj”, sed al ni mem — kiel tian direktadon de niaj energioj. La hinduismo ekzemple sukcesis apartigi la jogon disde la religia enhavo de niaj vivoj kiel hinduoj; tial multegaj homoj nun senprobleme jogas en siaj landoj laŭ siaj stiloj. Devus esti eble proponi Esperanton al la ĝuoj kaj riskoj de tia mikspota uzo.

**Kaj la enhavo de tiu strebado estas?..**

... ke ĝi pontas, kaj ke ĝi eĉ ikone reprezentas la mensan kaj kulturan pontadon mem kiel kategorion. Mi



kredas, ke mi sukcesos evoluigi — kun la helpo de multaj kunparolantoj en la membraro de UEA — tute ĝenerale uzeblan prezenton de tiu ĉi “pontada” enhavo de Esperanto. Ĝi pontas inter landoj kaj landoj, inter koroj kaj koroj, inter komprenoj kaj komprenoj, eĉ inter pontoj kaj pontoj.

Unu sekvo de tiu ĉi punta funkcio estas tio, ke Esperanto ankaŭ konservas siajn pontatojn — ekzemple, helpas konservi la integrecon de la etnaj lingvoj.

**UEA en la lastaj jaroj emfazas tiun flankon de nia laboro, sed kelkaj, ekzemple Gary Mickle, trovas ĉi tiun strategion tro proksima al la naciaj dektroj.**

Se oni ne vidas la diferencon inter la konservemo fare de pereotimantoj (kiuj do konstruas murojn) kaj la konserva efiko de la punta funkcio, oni povas fari tiun eraron, mislegi la nunan laborfluan de UEA, kiun mi intencas daŭrigi kun eksplicitaj krisignoj por malhelpi tian mislegon.

**Kio estas via slogano?**

Mi kredas je la slogano de Baghy “Kulturo = homa kompreno”.

**La Ondo deziras al samideano Dasgupta, kiu estas nia abonanto kaj okaza aŭtoro, fruktodonan laboron por la bono de UEA kaj de la tuta esperantistaro!**

La Elekta Komisiono de UEA ricevis antaŭ la limdato (31 mar 2007) 15 kandidatigojn por la ofico de komitatano C kaj 11 por la Estraro.

Barata lingvisto Probal Dasgupta estas la sola kandidato por la posteno de la prezidanto de UEA. Kiel kandidatoj por la vicprezidanteco estas proponitaj Ranieri Clerici (Italio), Claude Nourmont (Luksemburgio-Francio) kaj Amri Wandel (Israelo). Kanadano Yves Bellefeuille kaj polino Barbara Pietrzak pretendas esti ĝenerala sekretario. Aliaj kandidatoj por la Estraro estas Marija Belošević (Kroatio), Loes Demmendaal (Nederlando), Maritza Gutiérrez Gonzales (Kubo), Hori Jasuo (Japanio), José Antonio Vergara (Ĉilio).

La elektado okazos en la 92a UK (Jokohamo).



## La lasta estrarkunsido

La Estraro de UEA, elektita en la Pekina UK en 2004, kunsidis en Roterdamo 13–15 aprilo. Temis pri la lasta ordinara kunsido de la Estraro, kiu ja ankoraŭ kunsidos komence de la UK en Jokohamo, sed tie ĝi traktos nur la lastajn teknikajn demandojn pri la kongresa programo kaj la unua kunsido de la Komitato.

Plejparto de la tagorderoj de la aprila kunsido estas sama ĉiujare kaj ĉefe rilatas al la preparado de la kunsidoj de la Komitato, al kiu la Estraro devos raportoj pri sia agado en la antaŭa jaro kaj proponi buĝeton kaj aliajn planojn por la venonta jaro. Pro personaraj problemoj en la Centra Oficejo la financaj raportoj ankoraŭ ne pretis. Ĉar la plej gravaj eroj de la spezokonto tamen estis finkalkulitaj, estas jam klare, ke en 2006 la en- kaj elspezoj ekvilibriĝis. La buĝeto de 2006 antaŭvidis negativan saldon de 8650 eŭroj, sed la fina minuso estas nur kelkcent eŭroj. Por la jaro 2008 oni proponas plene ekvilibran buĝeton. La Estraro enoficiĝis fronte al deficino de 57194 eŭroj en 2003 kaj povas do kalkuli la finanĉan resanigon de la Asocio inter siajn ĉefajn atingojn.

Oni konfirmis la konsiston de la Loka Kongresa Komitato de la 93a UK en Roterdamo (19–26 jul 2008) kun Ans Bakker-ten Hagen kiel prezidanto.

La Estraro definitivigis, ke UK en 2009 okazos en Pollando por festi la 150an datrevenon de la naskiĝo de d-ro L.L. Zamenhof. La fina elekto okazos en Jokohamo inter Bjalistoko kaj Poznano.

La Estraro benis formale la jam pli fruajn intencojn transdoni la premiitajn verkojn de la Belartaj Konkursoj por publikigo en *Beletra Almanako*. Al la eldonserio *Oriento-Okcidento* estis akceptita *Maitreyi* de Mircea Eliade. La 23a okazigo de la fama Esperanto-aranĝo ARKONES en Poznano (21–23 sep 2007) ricevis aŭspiciojn de UEA.

**GK UEA**

## Sukcesa parlamenta sesio

En la tre digna kadro de salono afable disponigita de la Eŭropa Parlamento en Bruselo (palaco Altiero Spinelli) okazis la inaŭgura sesio de la nova Civita Parlamento, sub la prezido de Ljubomir Trifonĉovski (jama Vickonsulo) kaj Giorgio Silfer (nuna Konsulo) 19 marto 2007. Sekvis specifaj aŭdiencoj kun EU-parlamentanoj de la liberal-reformisma, socialista kaj kristan-demokrata grupoj.

Delegitoj kaj observantoj de 15 el la 21 paktintoj kunvenis por la Forumo, kiu aprobis direktivon pri komuna integriĝita biblioteka sistemo, aŭ direktivon Rogora, el la nomo de ĝia subskribintino.

La transnacia konsorcio, post mutualeco kaj lingvotestado, povas nun konstrui komunan framon koncerne la bibliotekojn. La direktivo interalie instituciigas la Internacian Tagon de la Esperanto-Biblioteko, en la 42a semajno de la jaro (la tria semajno de oktobro).

La Forumo aprobis ankaŭ rezolucion proponitan de Marc Hiltbrand, delegito de LF-koop, kiu indikas gvidlinion pri la triobla Esperanto-jubilea jaro 2009.

Indas ĉi tie rememorigi ke la decidoj de la Forumo ne havas politikan signifon, sed organizan, kaj ke ili koncernas la aktivecon de kolektivoj, ne de individuoj. Male, la decidoj de la Senato povas havi politikan signifon, kaj devontigas ne kolektivojn, sed individuojn.

La Forumo elektis la Kortumon 2008–09 kaj proklamis la rezulton de la baloto por la Senato, kiun tuj sekvis la ĵura ceremonio.

En sia festparolado kiel nova Konsulo Giorgio Silfer omaĝis al la tre baldaŭa (27 mar 2007) 50a datreveno de la Traktato de Romo, la plej grava etapo starte al la eŭropa integriĝo, per interesa historia retrospektivo. Li ankaŭ komparis detale la pseŭdan federismon

de EU kun la efektiva federismo de nia Civito. Kaj li emfazis la rolon de la nova Esperantio, ankaŭ vidalvide al la eŭropaj institucioj.

Marie-France Conde Rey, nova Vickonsulo, liveris la proponon de reformo de la Konstitucio, kiu fakte konsistas nur el la reduktado de la balotpremio por la Senato. La propono estos diskutata en la posta sesio.

La Senato ratifis la novan Kapitulon kaj konfirmis la leĝon pri la Ruĝa Kristalo (simbolo de unua helpo en la Civito) kaj la leĝon pri la Lingva Komitato.

Unuanime estis aprobitaj ankaŭ du rezolucioj: pri aliĝo al la monda kampano kontraŭ la grapolbomboj (fare de sen. Rooke, ruĝano) kaj pri iniciatoj okaze de la baldaŭa Monda Jaro de la Lingvoj (fare de sen. Martinelli, verdano).

La postan tagon du delegacioj havis aŭdiencojn kun parlamentanoj Marco Cappato kaj Maĝorzata Handzlik.

**HeKo**

## Florbukedo de la prezidento

(**Landa Agado**) Kroata Esperanto-Ligo organizis 13 apr okaze de la Tago de memoroj pri viktimoj de holokaŭsto kulturalan programon en la zagreba Zamenhof-Strato.

La programo komenciĝis per solena metado de florbukedo de la Prezidento de Kroatio Stjepan Mesić: la delegacio de la prezidento metis florojn al la stratotabulo kun la nomo Lazaro Ludoviko Zamenhof.


Post la floramaĝo la publiko marŝis, akompanata de tamburo, al la provizora scenejo muntita en la Zamenhof-Strato.

La programo omaĝis al la 90a datreveno de la morto de Lazaro Ludoviko Zamenhof. Reprezentanto de la zagreba Juda Komunumo *Bet Israel* Jasminka Domaš parolis ĝenerale pri la signifo de holokaŭsto.

Krom muziko en la programo estis voĉlegado el la libro *La Zamenhof-Strato* de Roman Dobrzyński. Aktorino Vida Jerman legis Esperantan fragmenton el la libro kun tradukoj en la kroata kaj slovena. Estis prezentitaj fragmentoj el la ĉapitroj pri getto en la pola, slovak, ĉeĥa, franca, japana... Je tamburo akompanis Kaja Farszky kaj Vlad Vucheta. Violonis infana duopo de Setsuko Shimizu.

Radio kaj tri ĵurnaloj raportis. Bela vetero allogis sesdekon da ĉeestantoj.

**Spomenka Štamec**



## Feliĉan Paskon!

8 apr sur la Placo Sankta Petro en Romo, post sia Paska mesaĝo, Papo Benedikto la 16a adresis bondezirojn en 62 lingvoj. En Esperanto li diris: *Feliĉan Paskon en Kristo Resurektinta.*

La bondeziron en Esperanto (antaŭlasta, post la samao kaj antaŭ la latina) atendis meze de cent mil personoj grupeto da kristanaj esperantistoj, gvidataj de Giovanni Conti, kiuj tradicie ĉeestis sur la placo kun siaj paneloj kiuj konsistigas la vorton “Esperanto”. La televida elsendo montris ilin plurfoje, sed tute aparte okaze de la Esperant-lingva bondeziro. Multaj preterpasantoj petis informojn pri Esperanto. Giovanni Daminelli, prezidanto de la itala IKUE-sekcio estis intervjuita de Radio Vatikana.

[www.ikue.org](http://www.ikue.org)

## Subtenu Mezan Amerikon

27–30 jul 2007 okazos la kongreso de ELNA (Usono) en la meksika urbo Tijuana ĉe la landlimo de Usono. Ĝi estas unika ŝanco venigi kelkajn mezamerikanojn kaj meksikanojn al la renkontiĝo kaj tiel plifortigi la situacion de Esperanto en tiu parto de la kontinento. Mono estas bezonata por vojaĝkostoj de tre aktivaj esperantistoj kiuj tamen ne povas mem financi sian partoprenon kaj por informado pri Esperanto en Meksiko. Por la vojaĝsubvencioj ni bezonas ĉ. 450 eŭrojn kaj por la informado 250 eŭrojn. Kiuj bonvolaj samideanoj pretus helpi la movadon en Mezameriko kaj sendus kontribuon al la Fondaĵo Ameriko de UEA kun rimarko “Tijuana”? Pagmanieroj en la Jarlibro de UEA.

**José Antonio Vergara**

## SAT-Amikaro en fama vin-regiono

Tamen, preskaŭ en ĉiu ĉambro, estis aŭtomata fontano, kiu liveris akvon laŭvole freŝan aŭ ne...

En la 62a kongreso de SAT-Amikaro, okazinta 7–10 apr, partoprenis 250 esperantistoj el ok landoj de Eŭropa Unio: Francio, Germanio, Belgio, Pollando, Danlando, Eŭskio (Hispanio), Britio, Nederlando.

Sufiĉe riĉa kaj varia, la programo ebligis ankaŭ al neesperantistaj alternativaj organizoj prezenti sian agadon en la franca: Nova Frateca Ekonomio, Ekovikultivado, Kampanara Konfederacio (en kiu aktivis la “alimondisto” José Bové — kandidato al prezidenteco de la franca respubliko), Kampanara Akceptado, Asocioj por pluigi kampanaran agrikulturon, *Servas*, La Naturamikoj.

Prelegoj temis pri “Libereco por lingvoj” (Francisko Simonet), “La danĝeroj de tabako” (Robert Molimard), “La komunikadproblemoj en la Eŭropa Parlamento” (Margareta Handzlik, pola eŭropa deputitino kaj esperantistino, kun traduko en la francan), Origamo kaj sorobano (du prelegoj de Kimie Markarian), “Ŝparado de la naturaj riĉaĵoj” (Marie-Hélène Désert), “La venonta SAT-Kongreso okazonta ĉi-somere en Parizo” (Vinko Markov).

Profesoro Robert Molimard eklernis Esperanton en 2004 je la aĝo de 77 jaroj. Nun 80-jara, li prelegis sen ĝenaj eraroj, kaj lia libro *La fume Smoking*

Zef (maldekstre), kiu biciklis de Brest (Francio) al Vladivostoko (Ruslando), interparolas kun Guy Martin de la gazeto “L’âge de faire” (*Fotis Henri Masson*)



estis (kaj estas nun) havebla ĉe la SAT-Amikara Libroservo en la franca kaj en Esperanto sub la titolo *La Fumado — Ĉu vi dezirus malfumadi...*, ankaŭ kun plia libro, kiun li publikigis ĉi jare en la franca: *Petit manuel de Défume* (Eta manlibro de malfumado).

La tre interesa prelego de s-ino Handzlik estis ilustrita per bildprezentado, ĝin oni povos espereble baldaŭ spekti en ŝia ttt-ejo.

La distra programo enhavis teatraĵojn *La Forlasita* de la Teatra Trupo de Tuluzo, koncerton de Jomo kaj liaj kvar muzikistoj kun nova repertuaro plejparte el orienta Eŭropo, kanzonojn de FaMo (Fabrice Morandeaŭ: *L’alarme je l’okulo*) kaj de Georgo Handzlik, la *Bardo sen barbo*, kaj la edzo de Margareta Handzlik.

La kongreso finiĝis per tuttagaj ekskursoj en tiu regiono fama pro siaj vinoj “Bordeaux” (Bordoza).

La amaskomunikila eĥo de tiu kongreso estis bedaŭrinde ne tre forta pro la Paskaj festoj. Tamen la monata gazeto *L’âge de faire* (La epoko por fari), pri ekologio, civitaneco kaj solidareco, publikigis en la aprila numero, aperinta antaŭ la kongreso, sur du centraj paĝoj dosieron pri Esperanto *L’espéranto pour embrasser le monde* (Esperanto por brakumi la mondon). Temas pri grandformata gazeto (A2: 42 × 59,4 cm), kies devizo estas “Scii – kompreni – agi”, kaj kies eldonkvanto atingas 60 mil ekzemplerojn. Tiu dosiero konsistas el kontribuoj de Claude Piron, Maryvonne kaj Bruno Robineau, Floreal Martorell, Georges-Henri Clopeau, Henri Masson, kunmetitaj aŭ reverkitaj de la ĵurnalistino Zoé Busca, kaj ilustrita per koloraj fotoj kaj desegno. La aperigon de tiu dosiero ni ŝuldas al Guy Martin, de la SAT-Amikara Grupo de Saint-Nazaire. El liaj klopodoj rezultis ankaŭ favora sinteno de la direktoro de la publikaĵo rilate al Esperanto, Alain Duez, kiu esprimis la intencon lerni Esperanton.

**Henri Masson**

## Nepalo malfermas la pordon

Situas en Nepalo la unua azia establo kiu petis la aliĝon al la Pakto por la Esperanta Civito. Jogambara Instituto de Esperanto, registrita en Katmanduo, estis unuanime akceptita de la Forumo en Bruselo la 19an de marto 2007. Ĝia prezidanto Gambhir Man Shrestha jam havis la civitanekon, petitan tra la redakcio de *Heroldo de Esperanto*, kies abonanto li estas delonge. **HeKo**



## Antaŭjubileaj Vintraj Tagoj

Kotka (“Aglo”) estas la nomo de havenurbo en sud-orienta Finnlando, gastiginta ĉi-jarajn Vintrajn Tagojn de EAF (Esperanto-Asocio de Finnlando) 10–11 mar 2007 kun sesdeko da gesamideanoj.

En la malfermo la partoprenantojn benvenigis la prezidanto de la urbestra komitato, eksparlamentano Anna-Liisa Kasurinen. Sed jam antaŭ la malfermo komenciĝis enkonduka Esperanto-kurso. Vespere, post interesaj kunvenoj, sekvis aŭkcio de objektoj donacitaj de anoj por esti vendataj profite al EAF. La lerta aŭkciisto Harri Laine vendis por 410 eŭroj.

Ĉar la centro de Kotka estas negranda insulo, vizitojn al la ortodoksa preĝejo kaj al fiŝozologia ĝardeno ni agrable faris piede, kiel ankaŭ vespere promenadon al akva parko. Ĉiu havas siajn favoratojn inter la vidindaĵoj, certe por multaj tio estis la preĝejo. La ortodoksa paroĥo en Kotka kun milo da eklezianoj plu kreskas, dank’ al novaj Kotka-anoj el Ruslando.

La jarkunvena tago estas dimanĉo, kiu komenciĝis per matenpreĝo okazigita de KELF, gvidita de Olavi Kantelle. Anna Ritamäki estis reelektita prezidanto de EAF. Kiel estraranoj por 2007–2008 elektiĝis Jukka Laaksonen, Tiina Oittinen kaj Päivi Saarinen. Sen reelekto restas por plia jaro Börje Eriksson, Tuomo Grundström kaj Taneli Huuskonen. La prezidanto dankis al Markku Saastamoinen, Marjaliisa Parpala kaj Raita Pyhälä pro la farita laboro en la estraro.

La jarkunveno traktis la agadraporton de EAF. Post kresko en 2005 la membronombro falis je 14 membroj

— ĝis 365, kio tamen superas la nombron de 2004 per 3 personoj. La okaziĝo de kursoj estis stabila, kaj plurloke lokaj esperantistoj kolektis la fortojn por realigi kursojn kaj ekspoziciojn dum 2007.

Helpe de la *Al kvalita komunikado*-projekta subvencio de Fondumo Esperanto, EAF sukcesis sen escepta ŝarĝo al siaj financoj aktive kunsidi, kio estis necesa prepare al la jubileaj eventoj — EAF estis fondita antaŭ cent jaroj, en 1907.

La plano por 2007 menciis krom la jubileajn, informajn kaj instruajn prioritatojn ankaŭ la neceson revigligi la laboron pri vortaro finna-Esperanto. La deziro estas fortigi la asocion sojle de la dua jarcento, sed necesas konscii ke vigla, videbla kaj altkvalita agado kunportas financajn riskojn.

La Aganto de la Jaro estis nomita Teuvo Alavillamo el Siikainen (norda Satakunta) pro lia granda merito krei finlingvan version de la reta kurso *lernu!* — studrondo tutmonda ofertanta anecon de Esperanta lernokomunumo jam en 24 lingvoj.

La Vintrajn Tagojn finis prezento de la centjaraj jubileaj aranĝoj kaj de la jubilea skatolo jam longe ĉirkaŭvaginta la landon. 28 apr en Helsinko okazos granda jubilea festo kaj bankedo. Kaj fine de julio ĉiuj estas bonvenaj en la Festivalo *Arta Lumo* al Kuopio en la ekzotika Savonio, ĉelaga regiono. Alilandanoj, kiuj flugos al Japanio pere de Helsinko, povos halti en Finnlando por la periodo de la festivalo. Aliĝilo al la festivalo estis dissendita kun la aprila *Ondo* (legu pli ĉe: [www.esperanto.fi](http://www.esperanto.fi)).

**Tuomo Grundström**  
**Anna Ritamäki**

La Jubilea Skatolo cirkulis tra la lando por inviti al la 100-jariĝa festo kaj kolekti gratulojn. En la Vintraj Tagoj en Kotka Esperanto-Klubo de Lahti (Vilorg Teräväinen kaj Martti Pennanen) transprenis la jubilean skatolon de la prezidanto de la instruista ligo ELFI, Carola Antskog, kiu rigardas la jubilean libron. (Fotis Anna Ritamäki)

## Por pli bonkvalita instruado

La internaciaj ekzamenoj de ILEI/UEA estis motivo por la Esperanto-grupo en Väsbjörns por organizi serion de ekzamenpreparaj seminarioj okazintaj en la Stokholma Esperanto-Centro dum tri semajnojn meze de februaro, marto kaj aprilo. Dek svedaj esperantistoj, kiuj deziras ekzameniĝi dum la sveda Esperanto-kongreso en majo 2007, partoprenis en 36 horoj da prelegoj kaj trejnado kiuj estis pli ol ekzamenpreparaj.

En la programo estis prelegoj titolitaj Homoj kaj ideoj (Bertil Nilsson), UEA-kongresoj kaj Japanio (Rune Moln), La parola lingvo de Esperanto (Christer Lörnemark), Esperanto-literaturo (Leif Nordenstorm) kaj Esperanto en edukado (Radojica Petrović). Du trionojn de la programo okupis lingvotrejnado gvidata de Lars Forsman.

La organizantoj Kaisa kaj Ole Hansen kaj Bertil Nilsson faris bonan kaj dankindan laboron.

La ejoj de la Stokholma Esperanto-Centro, kun meblaro kaj spacaranĝo modifeblaj por diversaj bezonoj, konfirmis sian taŭgecon por klerigaj kaj kulturaj programoj kaj aliaj laborbezonoj.

**Radojica Petrović**

## Moskvo: rezolucio por Esperanto

13 apr 2007 en la Ruslanda Akademio pri Klerigo (Moskvo) okazis Internacia konferenco “Propedeŭtika rolo de Esperanto en lernado de fremdaj lingvoj”. La celo de la konferenco estis diskuti la iniciaton de sciencistoj-esperantistoj enkonduki Esperanton en studplanojn de diversnivela ruslandaj klerigejoj.

La konferencon partoprenis 48 personoj inkluzive de speciale invitataj eksterlandaj gastoj: prof. György Nanovfszky (Hungario), prof. Günter Lobin (Germanio), prof. Akira Morita (Japanio), doc. Wim Jansen (Nederlando), Mikaelo Lineckij (Ukrainio), Steven Cobb (Usono).

Al la konferenco estis invitataj funkcioj el la Ministerio pri Klerigo kaj Scienco, Ruslanda Akademio pri Klerigo (RAK), Moskva Ŝtata Lingvistika Universitato (MŜLU), ŝtata kaj Moskva “Dumaoj” (parlamentoj), el aliaj institucioj, kaj ĵurnalistoj (televideoj kaj gazetoj).

La ĉefa oponento, prof. Irina Halejeva el MŜLU, doninta antaŭe negativan respondon pri la indikita problemo, al la konferenco ne venis.

La enkondukajn paroladojn por la diskuto faris prof. Nikolaj Nikandrov, prezidanto de RAK, kaj prof. Gennadij Ŝilo, rektoro de la Eŭropa Universitato *Justo*.

Dum kafopaŭzo la reprezentanto de la Ministerio, s-ino Nelli Rozina, deklaris: “Ne atendu de la Ministerio iun subtenon kaj eĉ ne turnu vin al ni. Ni nenion decidados”. El tiu deklaro eblas konkludi kun granda grado de vero, kial el naŭ personoj, rekomenditaj de la Ministerio kaj RAK por la konferenco, partoprenis nur du, kaj kial ili evitis pridiskuton kaj akcepton de la rezolucio. Tio estis atenco obstrukci la aranĝon.

Tamen tio ne havis sukceson, ĉar post vigla diskutado de la ĉeftema problemo la ĉeestantoj akceptis rezolucion (vd. pĝ 12), pledantan subteni efektivigatajn en Rusio eksperimentojn celantajn riveli kaj konfirmi propedeŭtikan valoron de Esperanto kaj enkonduki Esperanton en studplanojn de rusiaj klerigejoj samrajte kun aliaj fremdaj lingvoj kiel propedeŭtikan rimedon antaŭ lernado de fremda lingvo.

*Justo* eldonos libron kun tekstoj de “elpaŝoj” kaj videofilmon, kiuj mendeblis iom poste.

**Liana Tuĥvatullina**

## ISTK: Sukcesa internacia sesio

23 mar – 1 apr 2007 okazis la 32aj Esperantaj Tagoj de Bydgoszcz kun la 31a Sesio de Klerigejo de AIS en Bydgoszcz (AKB).

Partoprenis studentoj kaj prelegantoj el pli ol 20 landoj kaj kvar kontinentoj. Okazis 16 kursoj kaj ses prelegoj, kiujn gvidis diverslandaj profesoroj kaj fakuloj. Oni aŭskultis prelegojn pri turismo kaj kulturo en Japanio, Ĉinio, Mongolio, Uzbekistano, Senegalio, Tanzanio, Zimbabvo, Kanado, Albanio, Belgio, Bulgario, Estonio, Hispanio, Litovio, Latvio kaj Pollando. La sesion finis internacia ekzameno en Esperanto, dum kiu diplomverkojn prezentis kaj defendis studentoj el 11 landoj.

Ĝenerala Kunveno de la internacia klubo *Esperantotur*, okazinta en la kadra programo, pritaksis internacian turisman agadon 2006–07 kaj planis Esperanto-aranĝojn por 2007–08. Oni elektis 15-personan Konsilion kun prezidanto Andrzej Grzębowski (Pollando).

Kun la partoprenantoj renkontiĝis en la Urbodomo la urbestro de Bydgoszcz, Konstanty Dombrowicz. Trifoje prezentiĝis kun vigla muziko ensemblo *Afrika Umba* (Afrika Voĉo) kiun formas afrikaj studentoj de la Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo (ISTK) en Bydgoszcz.

ISTK estas nun la plej granda, laŭ nombro de eksterlandaj gestudentoj, altlernejo en Kujavia-Pomerelia vojevodio kun 115 gestudentoj el pli ol 20 landoj, kiuj venis por studi dum 2006–07, kaj “la plej granda ĉina altlernejo en Pollando”, laŭ la vortoj de la Konsulo de Ĉinio en Gdansk.

**ISTK**



Afrikaj instruistoj diskutas (Fotis Zsófia Kóródy)

## Inter barataj instruistoj

Post kelkmonata penado sukcese okazis 19 feb seminario por geinstruistoj en Whitefield (Bangaloro, Barato) en lernejo St. Thomas School.

19 diversfakaj geinstruistoj ekkonis la valoron de universala lingvo simpla, facile lernebla. Ili diskutis pri instrumentado, lernometodo kaj studkvanto por gelernantoj, speciale por komencantoj. La reprezentanto de ILEI en Barato (la subskribinto) disdonis al la geinstruistoj Esperanto-lernolibrojn kaj vortarojn, folietojn, broŝurojn. Ili promesis, kiel instruistoj, antaŭenigi Esperanton en siaj fakoj.

**Venkatesh Reddy**

## ILEI seminariis en Benino

18–24 feb 2007 la urbo Porto Novo (Benina ĉefurbo), kiu somere 2008 gastigos konferencon de ILEI, akceptis internacian seminarion, organizitan de ILEI kaj la Afrika Komisiono de UEA.

Partoprenis 17 Esperanto-instruistoj el Benino, Togolando, Niĝerlando, Niĝerio, Ebura Bordo, Germanio kaj Belgio. Gvidis Zsófia Kóródy. Ĝi estis ne nur afrika seminario, sed la unua internacie organizita esperanto-aranĝo en Afriko.

Unu el la celoj estis trejni la partoprenantojn por instrukapablo kaj al la preparado de la ILEI-konferenco en 2008. La temoj ebligis al la partoprenantoj profunde sciiĝi pri Esperanto-organizaĵoj, movadhistorio, gramatiko, literaturo, metodiko. Ĉiu seminario prezentis iun gramatikan temon, raportis pri sia nacia kulturo, lingvo, religio, kaj raportis pri sia landa aŭ loka Esperanto-movado.

**François Hounsounou**

## Agrabla vetero, varma Esperanto

La 17a Internacia Kurskunveno de Esperanto kaj Printempa kurso de Namkang-a Esperanto-Lernejo samtempe okazis la lastan martan semajnfino en la korea urbeto Chongdo kun 92 esperantistoj el 5 landoj (Koreio 69, Japanio 20, Aŭstralio 1, Hispanio 1, Kongolando 1). Ĝin kunorganizis Seula Esperanto-Kulturcentro (SEK, Koreio) kaj Esperanto-Populariga Asocio (EPA, Japanio).

Namkang-a Esperanto-Lernejo estis malfermita en la jaro 1998 laŭ la iniciato de d-ro Park Hwa-chong, vicprezidanto de Korea Esperanto-Asocio. Ĝia domo estas tipa korea malnova lernejo-formo, pro tio oni povas ĝui unikan malnovan lernejan etoson kaj flari freŝan aeron de la kamparo.

Unuafoje IKE okazis en 1991 laŭ la iniciato de koreo Lee Jung-kee kaj japano Takaŝi Agou (tiutempe ĝenerala sekretario de EPA) en la japana urbo Kjuŝu. La renkontiĝo okazis en Japanio ok fojojn sinsekve, sed ekde la 9a Kurskunveno (1999) la evento okazis alterne en Koreio kaj Japanio.

En la malfermo lernejestro Kuak Jong-hun, direktoro de la Esperanto-lernejo d-ro Park Hwa-chong, prezidanto de SEK Lee Jung-kee kaj internacia fakestro de EPA Tanaka Masa-miĉi donis bonvenigajn salutojn.

D-ro Lee Chong-yeong, eksprezidanto de UEA, prelegis pri “Deklaracio de Korea Sendependiĝo kaj Esperanto-etoso”.

En la unua tago, oni havis kurskunvenojn sub la gvido de naŭ gvidantoj, kaj en la Interkona vespero oni ĝuis belajn kantojn, muzikon kaj bongustajn krudfiŝojn. En la dua tago oni daŭrigis la lernadon kaj posttagmeze en la ferma ceremonio la standardo de Esperanto estis transdonita de SEK al EPA, kiu okazigos la 18an IKE post unu jaro en Kjuŝu.

**Lee Jung-kee**



Fotis Augusto Casquero

## La 21a etaĝo, kiu pli alte?

Mi havis la plezuron viziti la Esperanto-asociacion de Guanzhou (Kantono) en Ĉinio, laŭ invito de ties estro, John Weizhuo Li. Mi estas hispano, kaj malofte estas ebleco por miaj samlandanoj veni ĉi tien.

Veninte, mi estis ŝokita, ĉar la asocia sidejo troviĝas en la 21a etaĝo de 30-etaĝa nubskrapulo. Ĉu en alia parto de la mondo troviĝas esperantista klubejo en pli alta etaĝo?

La ĉinaj esperantistoj tre varme akceptis min. Post la komuna prezentaĵo, mi estis petata paroli-prelegeti. Kun plezuro mi parolis pri la Esperanto-movado en Hispanio, kaj tuj poste mi faris lecionon de la hispana lingvo, klarigante ĉion en Esperanto, enkonduke al kurso de la hispana lingvo — trimonata, ĉar mi restos tri monatojn en Kantono. Poste la klubanoj invitis min al restoracio, kie ni povis ĝui ĉinajn frandaĵojn, multaj el ili tute ne konataj de mi.

Kun plezuro mi instruos la hispanan lingvon kaj babilos en Esperanto, tiel alte situante.

**Augusto Casquero**

## 600 studentoj — nova rekordo!

2007 estas Esperanto-instrua jaro en Liaoning-provinca Esperanto-Asocio (LEA), Ĉinio. Shenyang-a Universitato reagis al tiu ĉi iniciato. 1 mar 2007, je la unua tago de la nova semestro, 600 studentoj eklernis en kvar Esperanto-kursoj de la universitato, kaj ĝis la mezo de aprilo neniu forlasis tiun ĉi nedevigan studobjekton. La studentoj akirus du studpoentojn se ili sukcese plenumos ekzamenon. La uzata lernolibro estas *Esperanto-Kurso de La Nova Jarcento* de prof. Liu Zhengkun kaj prof. Song Yunsheng.

Jam floras la unua Esperanto-kurso de la fremdlingvaj instruistoj de Liaoning-provincaj altlernejoj, ĉar profesoro Wang Wenyu kaj docento Pan Chengbo, instruistoj de la kvar grupoj, estas diplomitoj de la kurso. Ni tre dankas al profesoro Zhang Zhiming, kiu estas ankaŭ vicprezidanto de Liaoning-provinca Instrua Instituto de Fremdaj Lingvoj kaj vicprezidanto de LEA, pro lia penado. Li faris paroladon pri Esperanto-instruado en konferenco pri la provinca instruado de fremdaj lingvoj kaj prezidis la unuan Esperanto-Seminarion de Altlernejoj en la provinco.

Kion ni faros en proksima estonteco?

Ni, la estraranoj de LEA, daŭre vizitos altlernejojn en la provinco por vastigi la nunan agadon.

Laŭ deziro de la studentoj ni aktive kolektas materialojn en- kaj eksterlandajn por kompili novan libron pri gramatiko de Esperanto.

Ni invitos alilandajn Esperanto-instruistojn kaj la ekzamenan sistemon de UEA/ILEI por baki kvalifikitajn esperantistojn, kaj per tio ni povos krei radikajn kondiĉojn por la Esperanto-aplika jaro de LEA okazigota en 2008 aŭ 2009. Ni kontaktos tiun organizaĵon por realigi la deziron de kelkaj instruistoj aliĝi al ILEI.

**Wu Guojiang**  
vicprezidanto de LEA







## Amikoj apudas ĉe Volgo

Pli ol tricent personojn allogis la kvara Lingva Festivalo en volga urbo Uljanovsk, kiun 31 mar 2007 kunorganizis la fremdlingva fakultato de la Uljanovska Pedagogia Universitato kaj la urba Esperanto-klubo.

La temo de la festivalo, *Apudas amiko*, bone kongruas kun la nunaj streboj solvi intertnajn problemojn en la ruslanda socio. Pri la festivalo raportis loka televido.

La partoprenintoj povis viziti kvar el ĉirkaŭ dudeko da lingvoprezentantoj, interalie de la romaa, litova, mordva, *bafusam*, *dari* kaj aliaj. Funkciis ekspozicio de fremdlingvaj libroj, okazis lingvaj konkursoj kaj renkontiĝoj kun vojaĝemuloj. La bazan programon sekvis duhora internacia koncerto.

Dum la prezentado de Esperanto aperis dezirantoj lerni la lingvon, kaj la unuan lecionon de nova kurso (14 apr) vizitis dek personoj.

**Jurij Karcev**

## Kuraĝigu Kostarikon bildkarte

Unusemestra baza Esperanto-kurso en la Universitato de Kostariko, kun valoro de 3 kredit-unuoj, komenciĝis 9 mar. 22 studentoj aliĝis al la kurso.

Kuraĝigaj mesaĝoj estas bonvenaj en la formo de bildkartoj, kiujn ricevas kaj distribuas poste ĉe oficejoj dungitoj ne-esperantistaj, kiuj tiamaniere multfoje ekscias pri nia lingvo. Fine de la kurso la instruisto aranĝos ekspozicion kaj donacos ĉiujn bildkartojn al la lernintoj kiel memoraĵojn.

✉ Prof. Hugo Mora, Kurso de Esperanto, Esc. de Filología, Ling. y Lit. Universidad de Costa Rica, San José, Costa Rica **Hugo Mora**

**Uljanovsk:** prezento de la tataro lingvo (Fotis Firija Sultanova)

## Esperanto-Bosko en Pekino, Ĉinio

La 14an de aprilo 2007, je la 90a datreveno de d-ro Zamenhof, membroj de la Pekina Esperanto-Asocio (PEA) kunvenis en Esperanto-Bosko en Chaoyang-parko en Pekino. Esperanto-Bosko estas konstruita en la 89a Universala Kongreso de Esperanto antaŭ tri jaroj.

Je la 9a horo antaŭtagmeze pli ol 40 esperantistoj komencis akvumi la arbojn en la bosko. Inter ili estis maljunuloj pli ol 70-jaraj, studentoj de universitatoj kaj iliaj instruistoj, infanoj kaj iliaj gepatroj. Post akvumado la esperantistoj fotis sin antaŭ la ŝtonego kun la vortoj "Esperanto-Bosko". PEA alportis ekspoziciajn tabulojn por informi pri Esperanto al vizitantoj.

Tio estis la triafoja aktivado organizita de PEA en Esperanto-Bosko de post 2005. En marto de 2006 okazis tie aktivado memore al la 55a datreveno de la Ĉina Esperanto-Ligo.

**EPC**

## La 34a ŝtono en Malborko

Komence de aprilo en la unika Parko de la Mondo en Malborko, kreita de lokaj esperantistoj, estis 33 arboj kaj memor-ŝtonoj de diversaj ŝtatoj kun Esperanto-surskriboj.

La nombron da ZEOj en la Parko pligrandigis estrarano de UEA, profesoro Amri Wandel el la Hebrea Universitato de Jerusalemo. 6 apr li inaŭguris la memorŝtonon kaj plantis cedron por Israelo. Sur la ŝtono estas standardo de Israelo kaj du dediĉoj. La unua tekstas: "Por paco kaj toleremo". La dua estas dediĉita al Leo Sommerfeld. Sommerfeld estas patro de Amri Wandel, kiu antaŭ la Dua Mondmilito loĝis en apuda urbo Skorcz, kaj dum kiu fuĝis for de nazioj al Siberio, kaj de tie kun la Pola Armeo tra Persio al Israelo.

Post la inaŭguro de la ŝtono kaj cedro, la urbestro de Skorcz, Ryszard Dębek, invitis la gaston el Israelo kaj esperantistan delegacion de la malborka Esperanto-rondo *Kastelo* al Skorcz, kie okazis la renkontiĝo kun lernejanaj kaj aŭtoritatoj de la urbo, kaj post la vizitado de la urbo al la solena komuna tagmanĝo.

Prof. Wandel kaj d-rino Encarna Teruel el Barcelono, kiu akompanis lin, konatiĝis kun la Teŭtona Kastelo en Malborko. En Pelplino por ili kaj

por kelkaj esperantistoj de Malborko prezentis sian repertuaron folkloran ensemblo *Modraki* (Ceĵanoj). Ili vizitis ankaŭ Gdanskon, Fromborkon, Elblongon kaj natur-rezervejon *Vistula Terlango*. Survoje estis vizitata la nazia koncentrejo Stutthof, en kiu estis murditaj, inter aliaj, multaj judoj.

**Eduardo Kozyra**

## Pri Nepalo en la Esperanto-urbo

Dank' al la nova komisiito de la Germana Esperanto-Asocio por rondvojaĝoj, Lars Sözüer, estis organizita rondvojaĝo de nepala Esperanto-instruisto post Printempa Semajno Internacia en Bonn. La itinero gvidis tra diversaj urboj en Germanio: Duisburg, Herzberg, Hameln, Oldenburg, Bremen kaj Dortmund.

La aktiva Esperanto-instruisto kaj sekretario de Nepala Esperanto-Asocio Bharat Kumar Ghimire el Katmanduo ankaŭ restadis en la Esperanto-urbo Herzberg. Li vizitis la priesperantan ekspozicion en la urba biblioteko, salutis la urbestron Gerhard Walter kaj plurloke varbis por Esperanto.

Dum lia dutaga vizito en Herzberg (16–17 apr 2007) li prelegis entute kvarfoje pri la temo "Nepalo — krono de la mondo" pri sia hejmlando kaj la tiea Esperanto-movado, ekzemple en la loka gimnazio kaj al popolaltlernejaj grupoj. Volonte li respondis la nemalmultajn demandojn.

La regiona gazetaro antaŭanoncis la prelegon kaj poste raportis pri ĝi. Do estas bona reklamo havi kompetentajn kaj simpatiajn gastojn el foraj landoj.

**ICH**

**Sur la foto:** Bharat Kumar Ghimire kaj la urbestro Gerhard Walter en la Esperanto-urbo — la sola en la mondo.



## Unufraze

★ Ambasadorino de Litovio en Belgio, d-rino Nijole Zambaitė, kiu mem estas e-istino, akceptis esti membro de la honora komitato de la 7a Kongreso de Eŭropa E-Unio, okazonta ĉi-somere en Slovenio. (Povilas Jegorovas)

★ PEN-centroj el kvar kontinentoj (interalie tiu de Verkistoj en ekzilo) proponis Giorgion Silber kiel kandidaton por la posteno de Internacia Sekretario de PEN-Klubo; la baloto okazos en Dakaro (Senegalio) dum la PEN-mondkongreso en julio 2007. (HeKo)

★ La kvina Nitobe-simpozio okazos 2-3 aŭg 2007 en la Eŭropa Instituto de la Sophia-Universitato en Tokio kun la ĉeftemo “Eŭropaj lingvoj kaj aziaj nacioj: pasinteco, politiko, potencialo”. (*Esperanto*)

★ Slovena transnacia grandfirmao *Gorenje*, kiu havas filiojn en 30 landoj, mendis E-tradukon de la priskribo k uzado de tri mastrumaj aparatoj; Eo estos la 21a lingvo, en kiu *Gorenje* alparolas siajn klientojn. (Tomaĉ Longyka)

★ Gvidantoj de *Voki*, entrepreno de Mikrosofto fondita en Brazilo por helpi komputil-uzantojn per telefono, certigis la prezidanton de la Brazila E-Ligo, ke ili donis la nomon *Voki* en Eo por karakterizi la celon de la kompanio. (Landa Agado)

★ 30 mar tagjurnalo *Echo Dnia* (Eĥo de la Tago) en la pollanda urbo Radom aperigis tutpaĝan intervjuon de ĵurnalisto Zbigniew Baĵ kun Antoni Dorosz la ĉefestro de filio de PEA en Radom. (Antoni Dorosz)

★ Ĵus aperis okminuta DVD-filmo *Sentiments* pri Eo, realigita de studentoj en la Belarta Altlernejo de Angulemo (Francio); ĝi estas en Eo kun subtitoloj en la franca k povas ricevi alilingvajn subtitolojn. (HeKo)

★ Poŝkalendaro, eldonita de la Komitato por homaj rajtoj en Karlovac (Kroatio) surhavas 8 vortan kroatan-Ean *Etan vortaron de gravaj vortoj por kultivado de la koro kaj la spirito*. (*Tempo*)

★ Mira Anonen estis elektita kiel prezidanto de Finnlanda E-ista Junulara Organizo post la sesjara gvidperiodo de Patrik Austin, kiu restis en la Estraro. (*Esperanta Finnlando*)

★ La membraro de IFEF (Internacia Fervojista E-Federacio), la plej granda faka E-asocio, en 2006 malkreskis de 762 al 696; plej multaj IFEFanoj estas en Germanio 137, Francio 110 k Italio 65. (*Internacia Fervojisto*)



## Bonvenu al BET-43

Bone progresas preparado de la 43-aj Baltiaj Esperanto-Tagoj, okazontaj 14–22 jul 2007 en la nordlitovia urbo Ŝiauliai. Jam aliĝis 151 partoprenantoj el 12 landoj.

BET-43 estas dediĉita al la 80-jariĝo de la organizita Esperantomovado en Ŝiauliai. Okaze de tio aperos dulingva ilustrita libro pri la historio de Esperanto en Ŝiauliai, preparita de konata esperantisto kaj land-esploristo Romualdas Rutkauskas. Financadon de la eldono garantiis alia konata urba esperantisto Zenonas Sabalys.

La turisma informcentro de Ŝiauliai eldonos turisman informlibreton pri Ŝiauliai en Esperanto, kiun senpage ricevos ĉiu partoprenanto de BET-43.

La urba administracio de Ŝiauliai donis al la urba Esperanto-klubo *Ruto* 1500 lidojn (ĉ. € 435) por preparado de BET-43.

Petras Čeliauskas faros prelegserion pri la litovaj lingvo, literaturo kaj kulturo. Populara litova pastro kaj bona esperantisto Valerijus Rudzinskis celebros sanktan meson en Esperanto. En la Somera Universitato, kiun rektoros prof. Aloyzas Gudavičius, prelegos Nina Korĵenevskaja-Gourio (Francio), Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov (Kaliningrado, Ruslando), Tuomo Grundström (Finnlando) kaj kelkaj litovaj fakuloj.

Por BETanoj koncertos kaliningrada kantistino Natalia Striĵņjova, polaj ensembloj, eventuale ankaŭ litovia Esperanto-grupo *Asorti*.

Diversgradajn kursojn de Esperanto gvidos Nina Korĵenevskaja, Nina Pietuchowska (Pollando) k.a. Pri la instrua programo respondecas Graĉina Opulskienė.

Kaliningrada eldonejo *Sezonoj* prezentos la duan eldonon de *La Mastro de l' Ringoj* de J.R.R. Tolkien en la Esperanto-traduko de William Auld; ĝi estos presita en Litovio antaŭ BET.

Okazos ekspozicioj, kvizoj, filmoj, konkursoj, ludoj kaj riĉa ekskursaprogramo. Ĉiutage aperos gazeto de BET kaj funkcios riĉa libroservo.

**Povilas Jegorovas**

**La Ondo invitas al BETa kunveno de niaj legantoj kun porokaza kvizo.**

## Litovoj jpane festas kaj ridetas prepare al Jokohamo

Esperanto-klubo *Ruto* (Ŝiauliai, Litovio) invitis 14 apr al la tradicia printempa festo *Rideto 2007*. La inviton akceptis kaj venis 43 festpartoprenantoj el Ŝiauliai, Maĉeikiai, Plungė, Vilnius, Kretinga, Kaunas.

Unuafoje inter la gastoj estis prezidanto de Litova Esperanto-Asocio Povilas Jegorovas. Li invitis ĉiujn ĉeestantojn alveni en julio al Ŝiauliai kaj partopreni en la 43aj Baltiaj Esperanto-Tagoj.

Post la festa malfermo okazis ekskurso en la filio de muzeo *Aušra* — Domo de Venclauskiai, kie oni vizitis du ekspoziciojn: pri la skolta movado kaj pri maskoj. Post la muzea vizitado komenciĝis la amuza parto de la programo.

Ĉar ĉi-jare Universala Kongreso okazos en Japanio, ĝuste Japanio estis la temo de la vespera festo en la gastejo *Aronija*. Ĝi estis ornamita per la girlandoj de japanaj flagetoj, faldaĵoj de “origami”.

La partoprenantoj kompilis teamojn, kiuj konkursis. Oni lernis tralegi siajn nomojn jpane, divers-stile kantis litovajn popolkantojn Esperante kaj litove, kontrolis la lingvoscion de Esperanto solvante diversajn taskojn. Graĉina Opulskienė el Maĉeikiai montris kaj instruis, kiel japanoj faldas kaptukojn kaj adaptas ilin al diversaj kazoj kaj situacioj de vivo.

Estis elektitaj la plej bela paska ovo, la plej bela “origami” kaj la plej impresa kostumo de la vespero. Tradicie funkciis “Anonima poŝto”, kiu ekhavis grandan popularecon inter la partoprenantoj.

La temo ne estis hazarde elektita, ĉar jam 42 litovaj esperantistoj aliĝis al la Jokohama UK.

**Gediminas Kazlauskas**

En Ŝiauliai oni ridetas, sed ankaŭ ridis kaj ridegis (*Fotis Gediminas Kazlauskas*)



# Komenci interregistaran diskuton

Dušan Čaplovič, slovaka vicĉefministro, skribis 26 mar 2007 longan leteron al ĉiuj ministroj de eksterlandaj aferoj kaj al ministroj de Eŭropaj aferoj de membraj kaj kandidataj ŝtatoj de la Eŭropa Unio (EU), kaj al la membroj de la Eŭropa Komisiono.

Laŭ Čaplovič, la nuna diskutoperiodo pri la estonteco de Eŭropo, sekvinta post la negativa referendumo pri la EU-konstitucio en Nederlando kaj Francio, koncentriĝis sur politikaj kaj instituciaj demandoj. “Tamen, la problemoj de politiko pri lingvo kaj kulturo notindas pro sia malĉeesto”, — rimarkis Čaplovič kaj atentigis pri graveco de lingvo, eĉ pro pure ekonomia vidpunkto.

Vicĉefministro Čaplovič respondecas en Slovakio pri sciobazita societo, Eŭropaj aferoj, homaj rajtoj kaj minoritatoj. Li skribis en la angla lingvo ĉar “ĝi estas nuntempe la plej vaste komprenata lingvo en EU” kaj ĉar li kredas ke “la urĝo kaj bezono por efikeco de nia laboro postulas, ke nia subteno por multlingvismo ne malrapidigu nian funkciadon”. Čaplovič havas plurajn demandojn pri la “ofte malklaraj” lingvaj rajtoj. Ĉu ĉiuj oficialaj lingvoj estas egalaj? Kiam kaj kial la pivotaj tekstoj ne ĉiam haveblas en ĉiuj lingvoj? Kiel efike kaj kiom egale funkcias interpretado? Ĉu la EU-lingvosistemo egale bone servas ĉiujn ŝtatojn-membrojn? “La sperto de la novaj ŝtatoj-membroj de EU konfirmas, ke ofte ne”, — respondas Čaplovič al siaj propraj demandoj.

Čaplovič ne menciis Esperanton. Tamen li emfazis, ke la uzo de unusola etna lingvo favorigas kelkajn (anglalingvajn) landojn kaj klare malfavorigas la malgrandajn lingvojn. Čaplovič citis el la raporto de svisa profesoro François Grin, publikigita en oktobro 2005 ([http://cisad.adc.education.fr/hcee/documents/rapport\\_Grin.pdf](http://cisad.adc.education.fr/hcee/documents/rapport_Grin.pdf)). Laŭ Grin, la dominado de la angla lingvo en Eŭropo kaŭzas grandegajn kaj daŭrajn



Ján Figel' inŝence konstruis vojonojn por Čaplovič

financajn transsendojn al du ŝtatoj-membroj: po ĉ. 17 miliardoj da eŭroj jare al Unuiĝinta Reĝlando, kaj proksimume po 4% de tio al Irlando. “Tiom grandegaj financaj transsendoj kaj eblaj minacoj al niaj naciaj lingvoj pro kreskanta dominado de unu lingvo ĉe EU-nivelo, certe meritas nian atenton”, — vicĉefministro Čaplovič atentigis siajn Eŭropajn kolegojn.

“Estas klare ke Eŭropo bezonas efikan kaj egalecan komunikadon. Hodiaŭ ni vidas ke EU sukcese progresas en la ekonomiaj kaj sekurecaj kampoj, — daŭrigas Čaplovič. — Tamen, la tuta kompleksa problemoj, lingvo-politiko, kiu estas gravega por plua Eŭropa integriĝo, ankoraŭ ne estas priatentita”. Laŭ Čaplovič, la Konstitucia Traktato ne sufiĉe kovras la problemojn de EU-komunikado spite al la klopodoj de pluraj neregistaraj organizoj.

Laŭ Čaplovič, EU ekfari nur kelkajn paŝtojn al vera lingva politiko. Li notas ke la Eŭropa Komisiono komencis engaĝi sin pli aktive pri analizado de lingvo-politikaj problemoj kaj elpensi strategiojn por certigi lingvarajtojn, ekzemple, per studo pri kreado de Eŭropa Agentejo por Lingva Diverseco. Čaplovič ankaŭ laŭdas la laboron de komisionano Ján Figel', kiu en

novembro 2005 prezentis planon pri *La Nova Eŭropa Kadra Strategio por Multlingvismo*. Ankaŭ gravas, ke ekde 1 jan 2007 EU havas komisionanon kiu respondecas nur pri multlingvismo — Leonard Orban (Rumanio).

Čaplovič substrekas la gravecon de la agado en ŝtatoj-membroj kaj en EU-institucioj por plifortigado de lingvo-diverseco. Li notas, ke plendoj de Eŭropaj civitanoj povas efiki pri lingva uzado en Bruselo. Ekzempla estas la decido de Eŭropa Rajtprotektanto, ke la Konsilantaro rekonsideru la lingvo-reĝimon por prezidantaj retpaĝaroj, identigas malbonan administradon kaj lingvan diskriminacion. “Se ni dezirus pliproksimigi la Eŭropan Union al ĝiaj civitanoj, estas klare ke ĉiu prezidanteco de Konsilantaro de Ministroj uzu la oficialajn lingvojn de ĉiuj EU-civitanoj. Oni produktas la Komisionan retpaĝaron en 23 lingvoj — kial la Konsilantaro uzu malpli?” — demandas Dušan Čaplovič.

Kvankam Čaplovič ne menciis Esperanton, li atentigis pri la konferenco “Perspektivoj de Lingvo-politiko kaj Lingvaj Rajtoj en EU” (Bratislavo, novembro 2006). Li sugestis ke la raporto de la konferenco povas esti konsiderata kiel kontribuo al la diskuto pri la estonteco de Eŭropo fare de Slovakio kaj la aliaj Viŝegradaj landoj. Laŭ li, la konferencaj konkludoj povus instigi pluan pripensadon je naciaj kaj Eŭropa niveloj. “Venis tempo komenci interregistaran diskuton pri la lingvo-politiko en EU, komence je nivelo de ekspertoj... Mi forte kredas, ke spite al la kultura kaj lingva divers-konsisteco de EU ŝtatoj-membroj, ni povos progresi al la celo de lingva demokratio”, — li konkludas.

Dafydd ab Iago

La konkludoj de la Konferenco pri Perspektivoj de Lingvo-politiko kaj de Lingvo-rajtoj en la Eŭropa Unio, okazinta en novembro 2006 en Bratislava, ĉefe proponas (I) diskuti la problemojn de multlingvismo, lingvo-rajtoj kaj la promociado de lingvo-diverseco; kaj (II) kontribui al formulado de inkluziva lingvo-politiko por pligrandiĝanta EU kuntekste de la pensadoperiodo pri la estonteco de Eŭropo. La konferenco, malfermita de Dušan Čaplovič, havis kvar laborlingvojn: la slovakon, la anglan, la francan kaj Esperanton kiel ekzemplon de la neŭtrala lingva opcio. Ne formale voĉdonitaj, la konkludoj aparte notis ke “La konferenco petis la Eŭropan Komisionon komisi sciencan raporton pri la ebla kontribuo de planlingvo, ekzemple de Esperanto, por Eŭropa integriĝo kaj subtenado de multlingvismo, kaj la realaj atingoj de planlingvoj en la kampo de internacia komunikado, kiel studataj de la scienco interlingvistiko”.



## REZOLUCIO

### de Internacia konferenco "Propedeŭtika rolo de Esperanto en lernado de fremdaj lingvoj"

La 13-an de aprilo 2007

u. Moskvo

**Konsentante** kun la motiveco de la Rezolucioj de Ĝenerala Asembleo de UNESKO (1954, 1985), kiuj rekomendis enkondukon de la internacia lingvo Esperanto en studplanojn de klerigejoj en la ŝtatoj-membroj;

**konsiderante** la internacian pozitivan sperton de eksperimenta instruado de Esperanto kiel propedeŭtika rimedo dum lastaj pli ol 100 jaroj (Britio, Hungario, Germanio, Italio, Rusio, Slovenio, Usono k.a.);

**substrekte** la unikan rolon de ĉiujaraj internaciaj esperantistaj kongresoj kiel ilo por sentradukista interkomunikado kaj interkompreniĝo de reprezentantoj el diversaj ŝtatoj;

**taksante** modernan signifon de Esperanto kiel baza lingvo de internacia kunlaboro en scienco, tekniko, literaturo, arto kaj aliaj sferoj, en agado de Akademio Internacia de la Sciencoj San Marino, Internacia Akademio "Komenius" (Slovakio), Akademio de Esperanto (Francio) kaj multaj aliaj aktive funkciantaj en la lingvo Esperanto internaciaj organizaĵoj;

**pozitive taksante** Esperanton kiel rimedon, kontribuantan al forigo de ksenofobio, de nacia kaj religia malamikemo;

**konfirmante**, ke la lingvo Esperanto neniukaze celas anstataŭi per si mem iun el la etnaj lingvoj, sed male, strebas kontribui konservon de la lingvoj de ĉiuj popoloj, inkluzive la plej malmultnombrajn;

**atentigante**, ke en Esperanto en diversaj ŝtatoj estas eldonata originala literaturo — beletra (inkluzive porinfanan), scienca, teknika, jura, medicina k.a., kaj oni efektivas tradukojn el naciaj lingvoj en Esperanton kaj el Esperanto en la lingvojn de popoloj de la mondo;

**strebante** pli vaste uzi Esperanton kiel propedeŭtikan rimedon por lernado de fremdaj lingvoj;

**atentante** la rezultojn de praktika instruado de la lingvo Esperanto, kiuj atestas pri multe pli facila ekposedo de tiu lingvo, ol de ajna etna;

**bazante** sin sur la konkludojn de Internacia ekologi-lingvistika eksperta komisiono pri celkonformo de Esperanto-lernado en mezaj kaj superaj klerigejoj;

**konsiderante** la konkludon de la katedro pri internaciaj lingvoj de Eŭropa Universitato pri senelspeza enkonduko de Esperanto en studplanojn;

la konferenco opinias necesa turni sin al Ministro pri klerigo kaj scienco de Rusia Federacio kun la propono subteni la efektigatajn en Rusio eksperimentojn celantajn riveli kaj konfirmi propedeŭtikan valoron de Esperanto kaj enkonduki la internacian lingvon Esperanto en studplanojn de rusiaj klerigejoj samrajte kun ĉiuj aliaj fremdaj lingvoj kiel propedeŭtikan rimedon antaŭ lernado de fremda lingvo.

## Silfer subjektivas pri objektiveco

Laŭ Giorgio Silfer, *La Ondo* "... postrestas la grafikan evoluon en Esperantio, sed kompanse nete superas la organon de UEA kaj nordeŭropan skandalisman retgazeton, pro la objektiveco kaj bunteco de la informado" (LOdE-150, pĝ. 5).

Hm, ĉu la Esperanta gazetaro estas nun tiom riĉa ke ni eĉ havas nordeŭropan skandalisman retgazeton?.. Ĉu temas pri *Feroa Foiro* aŭ *Heroldo de Ŝetlando*?

Pli serioze, la aserton de Silfer parte mi konsentas, kun la rezervo ke pri objektiveco Silfer ne estas la plej kompetenta juĝanto. Cetere, estas bedaŭrinde ke la artikolo de Jukka Pietiläinen ne estis lingve korektita (eblus ŝuti sur ĝin manplendon da "la"), sed enhave ĝi tre interesis min. Ŝajnas ke la sola retgazeto kiun li mencias (sen precizigi ke temas pri retajo) estas hazarde iu nordeŭropa...

István Ertl (Luksemburgio)

## La Ondo, parto de nia kluba vivo

El tuta koro mi gratulas vin okaze de la jubilea, 150-a numero de *LOdE*. Ni deziras al vi pluajn sukcesojn en via grava agado.

Vladimir Lenin diris, se organizaĵo ne havas propran gazeton, ĝi ne povas longe ekzisti. Nia Esperanto-movado havas gazeton, kiu de jaro al jaro iĝas ĉiam pli bela, pli riĉenhava, pli interesa. En nia Esperanto-klubo ni ĉiam plezure ricevas *La Ondon* kaj multajn artikolojn ni legas kolektive kaj poste pridiskutas. *LOdE* fariĝis en Soĉi parto de la kluba vivo.

Tial ni ĉiam atendas venon de vica numero senpacience.

Vladimir Bespalov (Ruslando)

## Versa respondo pri legindo de l' Ondo

*Kial mi daŭre abonas  
Gardas kaj legas "La Ondon"?*  
*La magazino proponas  
Trovi kaj sendi l' respondon.*

*Ekster l' amika pensrondo,  
Dum la humor' animprema  
Save konvinkas "La Ondo"  
Pri Esperanto vivema.*

*Ne atingeblas kongreso,  
Nek festival' , nek tendaro,  
Sed ne forlasas l' impreson  
Pri l' nova pura vivmaro.*

*Mi ne solecas, ne mutas  
Kvazaŭ ŝlosite konstante.  
Pensas mi, lernas, disputas,  
Verve "La Ondon" legante.*

*Grandaj distancoj ne ĝenas  
Nek la deprim' senkompata.  
Ĉie mi nun partoprenas  
Dank' al "La Ondo" legata.*

*Mergas ĝi min en la mondon  
De la spirit' verde rava.  
Kial mi legas "La Ondon"?*  
*Mankas sen ĝi multo grava.*

Klara Ilutoviĉ (Ruslando)

## Nombroj, nombroj, nombroj...

En aprilo ni koncize informis (LOdE-150, pĝ. 11), ke en 2006 UEA spertis ioman malkreskon de sia membraro kun 6066 individuaj (IM) kaj 11732 aligitaj (AM) membroj.

Jaro	AM	IM	Sume
1987	36351	7291	43642
1988	35945	7203	43148
1989	32474	7355	39829
1990	25224	7645	32869
1991	19146	8071	27217
1992	18808	7783	26591
1993	16041	7272	23313
1994	14495	7018	21513
1995	13808	7237	21045
1996	13314	7284	20598
1997	13035	7122	20157
1998	12812	7360	20172
1999	12096	7075	19171
2000	12522	6583	19105
2001	12835	6479	19314
2002	10549	5713	16262
2003	11264	5714	16978
2004	12148	5854	18002
2005	12253	6107	18360
2006	11732	6066	17798

La malkreskon de IM (-41) klarigas tio, ke UK en Florenco kaj IJK en Sarajevo en 2006 estis malpli amasaj ol la respektivaj kongresoj en Vilno kaj en Zakopane en 2005, kaj malpli da personoj aliĝis al UEA/TEJO por ĝui la kongresan rabaton. En Ruslando, kie tiu rabato estas konsiderinda aliĝmotivo, la individua membraro falis plejmulte — je 72 anoj.

Pli draste falis la nombro de AMoj — tiuj membroj de la landaj asocioj, kiuj ne estas individuaj membroj de UEA. Du trionoj el tiuj malkresko (-521) okazis en Vjetnamio (-335).

Ĉinio .....	1051	Francio .....	670
Japanio .....	978	Germanio .....	546
Italio .....	771	Japanio .....	410
Germanio .....	758	Usono .....	361
Francio .....	562	Brazilo .....	360
Pollando .....	500	Italio .....	284
Belgio .....	477	Nederlando .....	262
Britio .....	374	Hispanio .....	186
Usono .....	361	Belgio .....	174
Svedio .....	313	Britio .....	171

Entute, plej multaj membroj de UEA estas en Japanio — 1388 (978 AMoj + 410 IMoj); sekvas Germanio (1304) kaj Francio (1232).

Plena statistiko de la membraro de UEA aperis en la aprila *Esperanto*, sed vidu pli amuzan tabelon por kompari laŭlande la popularecon de *La Ondo* kaj UEA. En 2006 la abonantaro de *La Ondo* (545) estis nur ĉ. 9% de la membraro de UEA (6066). Sed en Ruslando pasintjare estis 93 *Ondo*oj kaj 167 IMoj, do 55,6%. Ruslandaj IMoj legas la *Ondon* 14-oble pli volonte ol la japanaj, kaj nia abonantaro (16) estas nur 3,9% de la IMaro de UEA (410) en Japanio. Vidu la unuan landodekon laŭ ĉi tiu bizara kriterio:

Ruslando .....	55,6%	Islando .....	16,0%
Pollando .....	49,2%	Britio .....	15,8%
Estonio .....	21,7%	Litovio .....	14,3%
Norvegio .....	20,4%	Danlando .....	13,4%
Latvio .....	20,0%	Finnlando .....	13,2%

En la tabelo estas nur la landoj kun almenaŭ 20 IMoj, ja se ni konsiderus ĉiujn landojn, ni konstatus ke duono de la individua membraro de UEA en Uzbekistano kaj Zimbabvo abonas *La Ondon*. Tio estas vera, ja en tiuj landoj estas po ... unu nia abonanto kaj po du individuaj membroj de UEA.

Se ĉie oni abonus *La Ondon* same aktive kiel en Ruslando kaj Pollando, ĝin ricevdus tri mil abonantoj. Aĥ, revoj...

AIKO

## Esperanto + Filatelo = mirindaĵo

Ekspozicion *Esperanto-Filatelo* mi prezentis 8–11 mar en la ĉilia urbo Curacautín. Ĝi konsistis el leterkovertoj, ricevitaj de esperantistoj el 85 landoj, krome el libroj kaj revuoj en Esperanto. La ekspozicion apogis la loka municipo, Societo de Mutuala Helpe kaj korporacio de instruistoj.

Unuafoje la vorto “Esperanto” estis ofte aŭdata en la urbo pro intervjuoj en tri lokaj radioj (*Génesis*, *Curacautín*, *Colección*). La urbestro Raúl Reyes, surprizita pro la abundo de Esperanto-materialo, nomis ĝin “mirindaĵo” en sia malferma parolado.

Multaj lernantoj kaj instruistoj el naŭ lernejoj vizitis la ekspozicion, rigardis la esperantaĵojn kaj demandis pri la lingvo. Mi promesis reveni al Curacautín post unu jaro kun kolekto el 120 landoj. Tamen tio ne estos facila, ĉar al mia ĉi-jara alvoko respondis nur esperantistoj el Serbio kaj Nov-Kaledonio. Intertempe, mi ricevis invitojn fari ekspozicion en la kulturcentro de La Dehesa kaj en la universitato Mayor en Santiago.

Iván Mättig Catalán (Ĉilio)

## Por Esperanto nur komunista kandidato

Marie-Georges Buffet, el Franca Komunista Partio, estas la sola el ĉiuj kandidatoj, kiu senambigue esprimiĝis favore al Esperanto okaze de la prezidentaj balotoj de 2007 en Francio. Ŝi diris:

*Via deziro starigi universalan lingvon, kiu povus valorigi la interŝanĝojn inter ĉiuj homoj, enskribiĝas en profunde homa kaj progresema klopodo, kiun mi plene povas partopreni. Mi tamen neniel subtaksas la alportojn kaj la amligitecon de la popoloj al siaj kulturo kaj lingvo, ĉu regionaj, ĉu, kompreneble, naciaj. Esperanto ne povas, laŭ mi, malutili al tiuj realaĵoj, sed ilin pliriĉigi, proksimigante la homojn.*

El ĉiuj leĝproponoj deponitaj en Francio de deputitoj, senatanoj kaj partioj el diversaj politikaj horizontoj, la tri lastaj, (1995, 1996 kaj 1997) estis iniciatitaj de la KPF.

Henri Masson (Francio)



## Kvar kaŭzoj por legi *La Ondon*

“Kial mi legas *La Ondon*?” Por mi sola respondo ne povas esti. Unue: la nomo de la magazino apartenas al la historio de la Esperanto-movado kaj elvokas estimon al si. Due: la magazino ne estas proregistara presorgano kaj mi povas legi diferencajn opiniojn. Trie: Via libroservo bone funkcias. Kvare: Mi simple ŝatas la magazinon. Mi volus legi pli multe pri metodoj de propagando de Esperanto.

Aleksandr Rezniĉenko (Ruslando)

## Konsilo de profesiulo

Bedaŭrinde la poŝto tute ne garantias transsendon de leteroj. Korespondaĵojn disportas hazardaj homoj, ĉiuokaze aliaj, pro tio neniu respondecas pri la afero. La poŝtestro, al kiu mi turnis min por klarigi situacion, konsilis aŭ uzi registritajn leterojn, aŭ tute ne uzi la poŝtan servon. Jen bona konsilo de vera profesiulo! En tiaj kondiĉoj estus pli bone, se vi sendus al mi elektronikan version de la revuo.

Sergej Strelec (Ruslando)

# Fajro, fajro!

*Komentario de Wolfgang Kirschstein*

Sabato, la 3an de marto 2007. Estis multego da alilandaj ĵurnalistoj en la dana ĉefurbo Kopenhago. Ili estis tie por raporti pri la dua edziniĝo de eksprincino Alexandra kun fotografo Martin Jørgensen. Tiuj ĵurnalistoj povis aldone raporti pri violentaj manifestacioj en la stratoj de Kopenhago. Estis amaso da policanoj en la stratoj. Brulis rubujoj kaj veturiloj, flugis pavimŝtonoj. Buntaj junuloj, kun la arda partopreno de huliganaj turistoj, manifestaciis, ne por faligi lokan diktatoron, sed por konservi la rajton uzi iun domon, la intertempe jam faman domon sur Jagtvej (Ĉasista Vojo) n-ro 69.

## Iom da historio

La domo sur Jagtvej 69 estis konstruita kiel Domo de l' Popolo en 1897. Tie okazis gravaj eventoj en la historio de la laborista movado. Lenin gastis tie. Rosa Luxemburg kaj Clara Zetkin iniciatis en tiu loko la internacian bataltagon de virinoj. La dana sindikato por virinoj estis fondita tie. Sed iam en la 1950aj jaroj la domo estis kvazaŭ eluzita kaj la laboristoj ekhavis sian aktivadon en aliaj lokoj. Sekve en la 1960aj kaj 1970aj jaroj ne okazis multo en tiu loko.



En 1982 la komunumo de Kopenhago aĉetis ĝin kaj transdonis la rajton uzi ĝin al nedefinita grupo, kiun oni nomis “uzantoj de la Junulara Domo”. Tiuj uzantoj havis en la domo la eblecon evoluigi alternativan kulturon kaj provi novajn vojojn ekster la establitaj institucioj.

Ekzemple Björk, la kantistino el Islando — kiu mem nun estas parto de ĝuste tiuj institucioj — elprovis sian

stilon koncertante en la Junulara Domo.

Ankaŭ punkoj kaj la tielnomataj “aŭtonomuloj” trovis tie lokon por ilia specca aktivado. (*Aŭtonomuloj* estas en la dana politiko neklara grupo de personoj, kiuj perforte manifestacias kontraŭ aro de celoj kaj tendencoj en la socio kaj la mondo, ekzemple, kontraŭ “globaliĝo”, “kapitalismo” kaj “imperialismo”, “naziismo” kaj “rasismo”. Ofte oni jam uzas tiun titolon pejorative, ĉar kiam estas violento, tiam la aŭtonomuloj tre ofte estas proksime.)

En la domo estis brulo en 1996, sed la *uzantoj de la junulara domo* mem ekriparis la damaĝon. Finfine en 1999 la kopenhaga komunumo decidis vendi la domon. La tiama eraro de la politikistoj estis, ke ili ne faris interkonsenton kun la *uzantoj* pri iu alternativa loko. En 2001 kristana sekto kun la nomo *Faderskabshuset* (La Domo de l' Patro) aĉetis la domon, sed la *uzantoj* rifuzis forlasi ĝin. En 2004 juĝejo deklaris, ke la *uzantoj* ne plu havas la rajton uzi la domon sur Jagtvej 69. Kelkaj politikistoj klopodis premi la sekton, sed tiu ne cedis, ĉar laŭdire la gvidantino ricevis ordonon rekte de Dio pri tiu aĉeto. Aliflanke la junuloj rifuzis alternativajn lokojn, ĉar ili sentis ke ilia aktivado estis tro intime ligita kun loko kaj ĉirkaŭaĵo de Jagtvej.

“Dialogo” ne eblis en tiu situacio. La 1an de marto 2007 la polico malplenigis la domon. Post kelkaj tagoj la nova posedanto malkonstruis ĝin. Analoge al *Ground Zero* la (nun eksaj) *uzantoj* nomas la lokon *Ground 69*. Intertempe la junuloj okupaciis aliajn domojn (laste la 16an de aprilo). Kelkaj horoj sufiĉis por vandali ilin.

La junuloj argumentas, ke la violento en marto estis necesa, sed nur je la plej ekstremaj maldekstruloj ili sukcesis konservi simpatian. Pro la eventoj en marto ili perdis simpatian en preskaŭ ĉiuj tavoloj de la socio.

Tiom da historio.

La fotoj estas prenitaj el *Nyhedsavisen*.



## Alternativaj sociaj konceptoj. Kien?

La *uzantoj* de la tiama Junulara Domo proponis sian agadon kaj sin sub la signo de diverseco. Ili ankaŭ komprenis sin kiel la decan parton de la lando — kontraŭ la koruptaj politikistoj kaj la eĉ pli korupta povo de l' kapitalismo. Ĉiu socio bezonas homojn, kiuj pensas en novaj kaj alternativaj manieroj. En la 1970aj kaj 1980aj jaroj la tiamaj junuloj elpensis konkretajn manierojn por ŝanĝi la socion (ekzemple, ekologie), sed tiu spirito jam longe elvaporigis.

La *uzantoj de la junulara domo* povis manifestacii kontraŭ ĉio, sed apenaŭ estis rimarkebla, kio efektive estis ilia idealo kaj kiamaniere ili intencis atingi ĝin. La junuloj tie deklaris, ke estis bezono por alternativuloj, kiuj aspektas alimaniere, tio estas kun pingloj en ĉiuj aperturoj. Kompreneble, ili pravus, sed ili forgesis, ke tie estis loko nur por tiaj homoj kaj tio ne estas speciale promociiga por la diverseco en la socio. Tiel diverseco fariĝis uniformeco.

Tial tiuj junuloj similas al la danaj plenkreskaj maldekstruloj. Ili ofte havas ege vagajn proponerojn, ekzemple: “pli justa socio”, “pli da atento al naturo”, “protekto de malfortuloj en la socio” (ĉu iu kontraŭus?) ktp, sed ĝenerale ili kapablas nur retorike postuli tion, sen indiki konkretajn proponojn. Komentistoj konstatas ofte, ke la konservativaj kaj liberalistaj (do dekstraj) partioj realigas nun la projektojn de socialdemokratoj, kiuj ankoraŭ ne trovis konkretan strategion kaj ideologian armigon por trakti tiun konstelacion.

Ĉu estas same en aliaj landoj?



## Paĝoj el la historio de la Sukcena Lando (8)

### De Halina Gorecka

#### Krepusko de la teŭtona ŝtato

Malvenkoj de teŭtonoj en la 15a jc donis al la eklezia ŝtato ne nur teritoriajn perdojn, sed ankaŭ politikajn. Sur la restinta teritorio (nomata Ordena Prusujo) kruckavaliroj konservis malmulte da sendependeco. Ili devis agnoski la superecon de la pola reĝo; ili ne rajtis memstare kontrakti aŭ ekmiliti. Ĉiu novelektita grandmajstro estis devigata dum ses monatoj post la ekofico veni al pola reĝo kaj ĵuri.

La eksteran politikon de la grandmajstroj post la Toruna packontrakto (1466) karakterizis strebado revizii ĝin. Grandmajstro Friedrich von Sachsen dum dek du jaroj multe klopodis por levi statuson de la teŭtona ŝtato. Sub diversaj pretektoj li evitis ĵuri al pola reĝo. Li mortis en 1510 sen ĵuri, sed ankaŭ sen atingi siajn politikajn celojn.

En tiu malfacila periodo la ĉefo de la ordeno iĝis 20-jara Albrecht Hohenzollern. La elekto estis bone pripensita politika paŝo. Li estis filo de Friedrich von Hohenzollern, margrafo\* de Brandenburgio, kaj Sophie, filino de pola reĝo Kazimiro IV Jagello. Ankaŭ la germana imperiestro Maksimiliano subtenis Albrecht-on, esperante je alianco kontraŭ Jagelonoj en batalo por la ĉeĥa kaj hungara tronoj.

Malfacilaj rilatoj inter Pollando kaj Ordeno rezultigis militon en 1520–1521, en kiu neniu ŝancis venki. Albrecht packontraktis kun Pollando por kvar jaroj, dum kiuj li penis, senrezulte, trovi aliancojn en Germanio. La Ordeno estis perdonta la restintan suverenecon kaj iĝonta parto de Pollando.

#### La Ordeno perdis ĉion

Hazardo intervenis. En 1522 Albrecht konatiĝis en Nurenbergo kun arda predikanto Andreas Osiander kaj iom-post-iom konvertiĝis al Reformismo. Laŭ la konsilo de Martin Luther li decidis sekularigi la teŭtonan ŝtaton kaj fondi heredan princlandon. Post sukcesaj traktadoj kun la pola reĝo Sigismondo (la onklo de Albrecht) Albrecht venis al Krakovo. Ĉi tie 8 apr 1525 estis subskribita kontrakto pri sekularigo de la teŭtona ŝtato en Prusujo kaj pri fondo de Prusa Princlando sur tiu teritorio.

\* **Margrafo** (= markgrafo). Titolo de princoj de la Rom-germana Imperio; estro de Markio, t.e. regiono ĉe limo de imperio.

La nova Pruslando restis dependa de Pollando. Formale ĝi estis posedaĵo de la pola reĝo, kiun prusa princo ricevis por portempa hereda posedo. La rajton de hereda posedo ricevis viraj idoj de Albrecht kaj de tri liaj fratoj. Kaze de ĉeso de la vira linio, la princlando aŭtomate iĝus parto de la Pola Reĝlando.

Dum la impona ceremonio Albrecht ĵuris fidelecon al la pola reĝo Sigismondo. Per tio la teŭtona ordeno ĉesis ekzisti, kaj la 37a grandmajstro Albrecht Hohenzollern iĝis princo Albreĥto I (Prusa).

Kenigsbergo iĝis la ĉefurbo de Pruslando. En 1527 Albreĥto edzinigis Dorotean, filinon de la dana reĝo Frederiko I. Protestantismo estis deklarita la ŝtata religio. Post la mezepoka ordena periodo en la Sukcena Lando komenciĝis princlanda periodo, kun kiu venis humanismaj ideoj de Renesanco.

#### Prusa princlando

La loĝantaro de la nova princlando estis bunta etne kaj religie. Ĉi tie loĝis germanaj koloniintoj venintaj divers-tempe, prusoj, litovoj, poloj kaj aliaj etnoj. Apud la ekspansianta luteranismo daŭris romkatolikaj tradicioj. (Inter la 55 fratuloj, restintaj en Prusujo je la momento de sekularigo, sep restis romkatolikaj.) La plimulto de la prusalitava loĝantaro malkaŝe aŭ kaŝite restis fidela al siaj malnovaj paganaj dioj. (Ekzemple, en 1520, kun permeso de Albreĥto, prusaj kamparanoj de Sambio laŭ la pagana tradicio oferis nigran bovon al siaj dioj por ke tiuj protektu ilin kontraŭ pirataj rabatakoj.)



(Daŭrigota)

Por konstruado de la nova ŝtato kun centra potenco kaj unueca religio necesis fidinda aparato de ŝtatoficistoj kaj pastroj. Por kontaktoj kun aliaj ŝtatoj estis bezonataj kompetentaj diplomatoj. Por eduki junularon en la nova spirito necesis nove preparitaj instruistoj. Mankis kuracistoj. Resume: la ŝtato, eklezio kaj edukosistemo bezonis kompetentajn fakulojn.

Antaŭe la Ordeno invitis fakulojn el eksterlando aŭ direktis tien por studoj siajn junulojn (tiuj ne ĉiam revenis). Sed nun necesis pli radikala solvo — propra altlernejo. La tasko estis malfacila por la lando, en kiu mankis intelektaj tradicioj. Klerigado longan tempon ne estis respektinda kvalito inter teŭtonoj — pro senĉesaj militoj soldato pli valoris ol sciencisto. Grandmajstroj ne ŝarĝis sin per aparta klero kaj ne strebis proksimigi al si klerulojn. Escepto estis la antaŭlasta grandmajstro Friedrich von Sachsen, la sola kun universitata klero. Dum lia regado la Kenigsberga kortego akiris pli da eleganteco, ĉi tie formiĝis rondeto da homoj kun progresivaj, humanismaj ideoj.

Albreĥto ĉiam strebis vastigi siajn sciojn. En la junaĝo li akiris modestan kleron, sed volonte kaj interese li konversaciis kun kleruloj, vizitis sciencajn diskutojn kaj prelegojn. Li korespondis kun multaj elstaraj samtempuloj. Kiel princo, Albreĥto daŭrigis kaj evoluigis la kulturajn tradiciojn de Friedrich. Li invitis al sia kortego klerulojn, stimulis artojn, libroeldonadon, helpis evoluigi edukosistemon. La salonojn de la Kenigsberga kastelo ornamis artaĵoj de lokaj kaj eksterlandaj pentristoj. Albreĥto amikis kun la patro kaj filo Cranach. Lucas Cranach la Maljuna pentris du liajn portretojn (1511, 1528).

La unua presejo en Kenigsbergo estis fondita en 1523 por eldoni luteranan literaturon, ne nur en la germana, sed ankaŭ en la lingvoj pola, litova, prusa. Disvastigo de tiaspeca literaturo kontribuis al firmigo de konfesia unueco de la lando. En 1529, surbaze de la libroj el likviditaj monaĥejoj kaj tiuj de princo, formiĝis la Kastela biblioteko, kiu estis publike alirebla.

Sed la plej granda merito de Albreĥto estis fondo de la Kenigsberga universitato. Post la malfermo de la universitato en 1544, Albreĥto mem ofte vizitis lekcionojn aŭ konversaciis kun profesoroj.

**Sur la foto.** Albreĥto staras en la korto de la Marienburga Kastelo (*Fotis HaGo*).

## Konatiĝo kun Afriko

**Princo Henriko. *Festo de beno / Antaŭpar. Gbeglo Koffi. – Lome: ACE, 2006. – 24 pĝ.***

**Nkwirikiye, Michel. *Gasuku, la aventurulo – Lome: ACE, 2006. – 32 pĝ.***

Mi ricevis por recenzo du broŝurojn de Afrika Centro Esperantista (ACE). Tre modesta, “samizdata” aspekto — sed indas ĉiam memori pri afrika vivnivelo. En la antaŭparolo Gbeglo Koffi prave plendas, ke eŭropanoj tute ne konas afrikan kulturon, kaj pluraj modernemaj afrikanoj mem neglektas kaj evitas ĝin...


La novelo de Princo Henriko *Festo de beno* estas evidente adresita al neafrikanoj, do enhavas plurajn klarigojn en la teksto mem kaj aparte librofine. Ĝi rakontas pri okazanta granda vilaĝa festo, dum kiu — laŭ mesaĝo de loka ĉefpastro, kvazaŭ ricevinta sciigon de dioj — iu fremdulo devas morti. Loka gravulo havis malbonan sonĝon pri samo. Oni konkludas averti alvenontajn fremdulojn, ke ili neniakaze eniru la sanktejon, kie lokanoj ricevas benon. Nekredema, eŭropece edukita junulo el alia provinco mokas la superstiĉon... Traleginte duonon de la novelo, oni jam povas konjekti la finon: la aroga fremda junulo ja eniros la sanktejon kaj tie mortos, tio perturbos la riton kaj, onidire, kaŭzos multajn malfeliĉojn por la tuta gento dum proksimaj jaroj. Naiva kaj malverŝajna (el vidpunkto de eŭropano) rakonto tamen lernigas nin pri niĝeriaj vivkutimoj. Preseraroj ne tre multas kompare kun similaj libroj el Eŭropo aŭ Ameriko, nur misaj citilsignoj tre ĝenas legadon kaj komprenon. Foje aperas strangaj esprimoj kiel “ne tuj iris hejmen tuj” (pĝ. 11), sed ankaŭ esprimoj sukcesaj kiel “(vi ne aŭdis) ...ĉu mi havas akvon buŝe?” (pĝ. 8), “duope aŭ pli-ope” (pĝ. 9) aŭ “iu, kies kapo estas en ordo” (pĝ. 12). Troveblas proverbecaj popolsaĝaĵoj: “Bufo ne forkuras vespere senkaŭze: aŭ io postkuras ĝin aŭ ĝi postkuras ion” kaj “kutime serpento, kiun solulo vidis, estas ofte la danĝera pitono” (pĝ. 10). Impresas la frazo: «“Sovaĝa viandaĵo” estas karesnomo por vilaĝaj knabinoj, kiun oni uzas en la lernejoj» (pĝ. 18).

Post tio mi prenis la alian broŝuron, *Gasuku, la aventurulo* de Michel Nkwirikiye — sed spertis frustriĝon. En la kajeron estas mise envinkitaj la paĝoj kun jam ĵus traktita *Festo de beno* (plena teksto krom lasta duon-

paĝo), sed el la vera *Gasuku* nur paĝoj 15-22 kaj 33-34. Mi ne scias, ĉu la tuta eldonkvanto estas fuŝita — sed evidente malbonŝancis ne nur mi... Estas pecoj el probable bela kaj instrua fabelo pri papago kaj hundo — certe, por ĝui ĝin oni bezonas havi plenan tekston. Espereble, deca eldono iam aperos. Ankaŭ en *Gasuku* protagonistoj en siaj interparoloj uzas proverbecajn popolsaĝaĵojn — eĉ multe pli ofte, ol en *Festo de beno*, po kelkfoje sur ĉiu paĝo, kaj tiuj proverbaĵoj (iuj okcidenteskaj-zamenhofeskaj, aliaj nekutimaj por ni) estas kursivigitaj.

Do, ACE montris al ni afrikan kulturon, kiu ja meritas konon, eĉ se ŝajnas malmoderna. Se oni pretendas tutmondecon de Esperanto — do ankaŭ Afriko estu prezentita, dezirinde en pli digna eldono. Ni esperu sukcesan aperon de pliaj libroj el Afriko.

**Valentin Melnikov**



### Leginda por ... distriĝi

**Gates, Ronald Cecil. *Mortiga ekskurso. – Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 2006. – 111 pĝ.***

La aŭtoro, Ronald Gates, estas emerita profesoro, kiu post sia emeritiĝo verkis jam relative grandan nombron da krim-noveloj kaj -romanoj. La scenejo en tiuj verkoj estas preskaŭ senescepte imagata universitato aŭstralia kaj la ĉirkaŭanta medio.

Ĝenerale la priskribo de eventoj estas relative leĝera, nur sufiĉa por indiki la etoson, sed sen multaj detaloj. Parolo kaj ago distingas la rakontojn. Tial la leganto ne bezonas cerbumi multe por sekvi la intrigon. Oni ne serĉu lerte kaŝitajn spurojn, por eltrovi la krimulo(j)n. Estas kvazaŭ la leganto

akompanas la detektivon aŭ policiston dum la enketado, tiel ke la solvo de la krimo ne estas antaŭvidebla. Tiel estas en ĉi tiu romano. La krimulo estas trovita preskaŭ hazarde, post multe da serĉado farata de la policisto, Komisar Roberto Elis, kiu pridemandas suspektindulojn. Sed sukcesa identigo de la tute ne suspektita kulpulo ŝuldiĝas al hazarda trovaĵo fare de universitata gardisto Petro Tomson.

La intrigo: Naŭ klasanoj de kurso de botaniko, gvidate de docento Doktoro Marŝman, piknikas kaj esploras en granda praarbaro proksime de la universitato. Relative tipa medio aŭstralia, kie ekster la urboj la naturo estas ankoraŭ pli-malpli sovaĝa. Dum la ekskurso Doktoro Marŝman vagas for de la grupo, sed neniam revenas. Post serĉo oni trovas lian kadavron: laŭaspekte li falis de la supro de krutaĵo, sed kuglotruo en lia korpo indikas murdon. Lia propra pafilo troviĝas, sed kvankam samkalibra, scienca ekzameno montras ke ĝi ne estis la murdilo.

En la kabineto de Doktoro Marŝman, ĉe la universitato, oni konsciigas ke li ne estis tute honesta persono. Li ne malemis postuli subaĉeton, por garantiĝi sukceson al studentoj; ĉantaĝo ankaŭ estis hobiaĵo lia. Verŝajne iu viktimo lia lin murdis, sed se tiel, kiu, kaj pro precize kio?

Tion devas elserĉi Komisar Roberto Elis. La romano estas facile legebla kaj nepre distra. Ĝia kvalito estas literature meza: la stilo de la aŭtoro estas ĝenerale bona; ĝi ne tedas, kaj oni deziras plulegi ĝis la fino. La leganto nek anticipas, nek renkontas grandajn surprizojn. Se oni legus pri la eventoj en tagjurnalo, oni ne miregus. Tiaĵoj ne okazas ĉiutage, sed ili ja kelkfoje okazas.

Kelkaj gramatikaj idiosinkraziaĵoj ĝenis min dum la legado. La aŭtoron influis aŭstralia esperantologo, kiu volas enkonduki uzadon de supersigno en la esprimoj *káj ... káj kaj áŭ...áŭ* por ilin elstarigi; kaj enkondukas du novajn gramatikaĵojn: *ante (de)* por anstataŭi la esprimojn “farante” kaj “rilate al”; kaj *ate (de)* anstataŭ “fare de” aŭ simpla “de”. Ankaŭ *el de* kiam tute sufiĉas simpla “el”. Sed Ronald Gates tre nekonsekvence uzas tiujn esprimojn.

Kelkfoje, sed tre malofte, anglismoj ne estis elsarkitaj. Da kompost-eraroj estas nemulte. Multe pli malplaĉis al mi la fakto ke dum dua lego de la romano, la gluo kuntenanta la



paĝojn kaputis. La kovrilo defalis, kaj aliaj paĝoj minacis kunfali.

Malgraŭ tiuj priplendindaĵoj, la romano estas, ensume, interesa. La stilo ne estas altranga sed akceptebla. Do leginda libro kiam oni volas distraĵon.

**Don Broadribb**

## Arte malambicia, sed psikologie instiga deliciaĵo


**Ŝtimec, Spomenka. Hodler en Mostar. – Pisa: Edistudio, 2006. – 105 pĝ.**

Unue mi ne tro komprenis, kun kiu(j) celo(j) Spomenka Ŝtimec verkis tiun libron. Kiam mi starigis al ŝi tiun demandon, ŝi respondis, ke la celo estis: “Beletre vivigi unu el la modelinoj de F. Hodler por stimuli legantojn interesiĝi pri la reala Hodler patro kaj Hodler filo. Atentigi ke en Sarajevo, la urbo kiu ege suferis, troviĝas io rilatanta al nia Esperanto-kulturo”. Kun tiuj klarigoj mi kredis, ke mi pli bone komprenos kaj rekomencis legi la libron. Traleginte la tekston, mi tute ne bedaŭris, ke mi prenis la tempon por tion fari. Des pli ĉar en 2006 mi havis la okazon viziti la ĉefurbojn de Bosnio kaj Hercegovino.

Kiel (eble ne ĉiam vaste) konate, Hector Hodler, la fondinto de Universala Esperanto-Asocio en Ĝenevo en 1908, estis la filo de la svisa nacia pentristo Ferdinand Hodler (1853–1918). Sed Hector ludas nur marĝenan rolon en la nova libro de Ŝtimec. Multe pli en la centro de la atento staras Jeanne Charles-Cerani-Ĉiŝić.

Ĉi tiu franca virino, kiu venis el Liono en Svislandon dank’ al stipendio, servis al Hodler kiel modelino (kaj amatino) inter 1901 kaj 1916. Tiukaze ŝi kolektis aŭ heredis de li centon da pentraĵoj. Fakte dum longa tempo la vizaĝo de Jeanne ornamis la 50-frankan bileton de la Svisa Nacia Banko.

Post la morto de la muzikisto-dirigento Antoine Cerani, la edzo de Jeanne, kaj de Valentine Godé-Darel (en 1914), kiu estis alia amatino de Hodler, kun kiu li eĉ havis filineton (kiu fariĝis la duonfratino de Hector kaj estis poste adoptita de Berthe Hodler), Jeanne eklaboris kiel flegistino en la hospitalo, kie ŝi devis asisti operaciojn ĉe militviktimoj kaj flegi ilin. Tiukaze ŝi konatiĝis kun Mehmed Ĉiŝić el Mostar en Bosnio-Hercegovino, al kiu ŝi edziniĝis kaj kun kiu ŝi veturis al Usono kaj Kanado, kie la diplomato reprezentis la jugoslavian registaron. Jen do la interesa konekto



inter Hodler kaj Mostar-Sarajevo, kiu kondukis ĉe la kroata verkistino al la ideo skribi la fragmentecan biografion de la Hodler-modelino. Kun sia Meho Jeanne do havis la okazon veturi al Jugoslavio — Beogrado, Mostar, Niš — kaj konatiĝi kun la arkaika mondo de Balkanio, kiu tiutempe ankoraŭ estis forte influita de la turka mental-eco. Ŝtimec uzas en sia rakonto aron da turkaj etnografiaj vortoj, kiuj donas al la teksto eĉ iom ekzotan ĉarmon.

Jeanne mortis en 1955 en Mostar, tre baldaŭ post ŝi ankaŭ Meho mem. Postrestis 280 Hodler-pentraĵoj, pri kiuj la direktoro de la Artista Galerio en Sarajevo interesiĝis. En 1966 estis subskribita kontrakto kun la heredantino Emina Korkut pri la aĉeto de la kolekto. En aprilo 1978 parto de la kolekto estis prezentita en la Artmuzeo de Berno, denove en 1998 en alia ekspozicio en Olten. Aperis akompanaj katalogoj (kun interesaj klarigaj tekstoj pri la vivo de Jeanne ktp.). La iom sensacia specifaĵo de tiuj bildoj estas, ke unu triono enhavis intervenojn de la posedantino, do ili evidente estis surpentritaj de Jeanne. Pro ŝia

fuŝado Jeanne ne estis aparte ŝatata ĉe la Hodler-amantoj. Kiam en Sarajevo eksplodis la milito en 1992, la Hodler-artaĵoj estis ŝirmitaj. Post la militfino estis rimarkite, ke pluraj pentraĵoj eĉ malaperis. Plurajn bildojn trafis militdamaĝoj, kaj ili devis esti restaŭritaj; oficialaj svisaj instancoj investis duonmilionon da frankoj por la renovigo de la muzeo mem. En 1998 povis esti prezentita en Sarajevo centdudeko da hodleraj verkaĵoj. Tiel la nekutima trezoro fariĝis daŭre alirebla al la interesata publiko.

La biografia-historia-geografia rakonto en 23 ĉapitroj de Spomenka Ŝtimec pri Jeanne Charles-Cerani-Ĉiŝić, kiu portis la animon (aŭ spiriton) de Ferdinand Hodler al Mostar kaj Sarajevo, estas lingve senpretenda teksto, ĉar verkita en iom tro simpleca stilo. Kiel temo ĝi tamen vekas intereson precipe por legantoj, kiuj havas ian rilaton al Ferdinand Hodler kaj ties filo Hector, kiu iel hazarde kaj senkulpe aperis en tiu mondo kiel frukto de unu el multaj pli malpli hazardaj amaferoj de sia patro. Tamen bone ke ekzistis tiuj amaferoj kaj tiuj homoj. Kaj bone ke la sentema zagreba verkistino, kies fokuso celas la virinan psikon, eluzas sian talenton por krei psikologian beletron.

Persone mi dezirus, ke la verkema kroatinio altigu sian Esperanto-lingvonivelon, pli forte eksperimentante per la reale ekzistanta Esperanto-vortrezoro, por ke ŝiaj verkoj fariĝu lingve malpli tedaj kaj por ke oni povu pli facile imagi ŝin kiel indan Nobel-literatur-kandidaton. Ĉar mankas fontindikoj oni ne scias, sur kiuj dokumentoj Ŝtimec baziĝis kaj kio estas realo kaj kio fikcio en ŝia rakonto. Plurajn erarojn (Holder, ridesklopodis, evoluigi — ne evolui — diskutojn, svurvoje k.s.) oni povintus eviti. La traduko de la libro al la franca aŭ germana lingvo estas por mi imagebla.

**Andreas Künzli**

La 15an de aprilo Jascha Hoffmann, kunlaboranto de *New York Times Book Review*, anoncis en la rubriko *Comparative Literature*, ke ruslanda eldonejo *Sezonoj* en 2007 reeldonos la Esperantan version de *The Lord of the Rings* de Tolkien en la traduko de skota poeto William Auld. Ĝi elĉerpiĝis baldaŭ post la eldono, kaj ĉi tiu plej populara beletra libro de la 20a jarcento (laŭ BBC) denove aperos en nia libromarkato. Ĉi tio iĝis ebla danke al la prunto de la fondaĵo FAME. Zorga kontrolado fare de kelkaj provlegantoj ebligis elsarki plurajn erarojn, kiuj enŝteliĝis en la unuan eldonon. *La Mastro de l' Ringoj* estos lanĉita en BET-43 en Ŝiauliai, ĉar ĝi estos presita en Litovio kun kovriloj de Kaŭna libroartista Vladimiras Beresniovas. La projekt-gvidanto, Aleksander Korĵenkov, poste prezentos la libron en *Arta Lumo* (Finnlando, julio), en *Sukcena Ondo* (Kaliningrado, aŭgusto) kaj en *ARKONES* (Poznań, septembro).

## Kolokvo en Vieno

Nia planlingva spirita heredaĵo estas konservata en bibliotekoj kaj arkivoj. Ĉi-rilate bedaŭrinde ekzistas multaj problemoj, tro ofte nekonsciataj. Pro tio la Esperantomuzeo kaj la Kolekto por Planlingvoj de la Aŭstria Nacia Biblioteko, Vieno, aranĝos internacian kolokvon en Esperanto je la temo “Planlingvaj bibliotekoj kaj novaj teknologioj”.

La kolokvo okazos 19–20 okt 2007 sub teknike bonaj kondiĉoj en la nova sidejo de la Esperantomuzeo. La celo de la kolokvo estas prezenti la ĉefajn problemojn, kiujn frontas diverstipaj planlingvaj bibliotekoj kaj arkivoj kaj kiuj estas solvendaj.

### La antaŭvidita programo:

- prezento de la aktuala situacio de Esperantomuzeo kaj la Kolekto;
- informoj pri gravaj bibliotekoj kaj arkivoj;
- utiligo kaj diskonigo de la riĉaĵoj de la kolektoj;
- problemoj de la modernigo de la kolektoj, i.a. per utiligo de novaj teknologioj.

La reciproka konatiĝo de la koncertaj respondeculoj, la komuna pridiskuto de la nuntempa rolo de niaj bibliotekoj kaj arkivoj, helpu al ni trovi konvenajn vojojn kaj metodojn por starigi kunlaboron kaj interhelpon.

La celgrupo estas unuavice personoj, kiuj sin engaĝas profesie aŭ amatore por planlingvaj bibliotekoj kaj arkivoj, konscias kaj povas informi pri la defioj kaj solvendaj taskoj kaj pretas agi al ties solvado.

### Programskemo:

19 okt. Malfermo (9h00), faka programo, komuna vespero;

20 okt. Daŭrigo de la faka programo ĝis vespero.

La teknikajn aferojn de la restado (tranoktoj ktp.) solvos ĉiu partoprenonto mem.

✉ Kolekto por Planlingvoj kaj Esperantomuzeo, Palais Mollard, Herengasse 9, A-1010 Wien, Aŭstrio.

✉ [herbert.mayer@onb.ac.at](mailto:herbert.mayer@onb.ac.at)

<http://www.onb.ac.at/sammlungen/plansprachen/index.htm>

Herbert Mayer



## Ni lernu de lia saĝo

[Lapenna, Ivo]. *2 paroladoj de Ivo Lapenna: Diskoj I, II, III, IV, V.* — Kopenhago: *Fondaĵo Ivo Lapenna*, 2003 kaj 2006.

Estas agrable sidi hejme ĉe komputilo kaj skribi la subajn liniojn. Samtempe mi aŭskultas la mondfaman oratoron Ivo Lapenna, por kiu mi siatempe (1971) interpretis dum liaj juraj prelegoj en la Universitato de Turku.

Apude kuŝas sur mia skribotablo kompaktdiska kovrilo kun trafa foto de liaj konataj vizaĝtraĵoj. La kutima cigaredo — lia fidela akompananto — ricevis lokon en la mano de nia konata jura sciencisto. Trankvila, kolora, tre plaĉa kaj sonora voĉo kondukas min en la pasintajn travivaĵojn, kiuj freŝe revenas en mian memoron. Estas sole na kaj silenta momento en la hejmo, el kiu ĉiuj aliaj membroj jam forflugis en la mondon kaj en la ĉielon. Pensflugile mi daŭrigas la dialogon kun profesoro Ivo Lapenna.

Ne eblas flankenmeti la konatan festparoladon, prezentitan en Haarlem 1954 dum la 39a UK. “La fundamento, sur kiu kuŝas la tuta konstruaĵo de Esperanto, estas la lingvo mem. Surbaze de la genia kreaĵo de doktoro Zamenhof, ni sukcesis en nuraj sep jardekoj transformi projekton en vivantan, plene funkciantan lingvon”. D-ro John Wells, prestiĝa fonetikisto el la Londona Universitato, bele akcentas la signifon de tiu ĉi parolado, kiu donas modelan ekzemplon kaj entuziasman inspiron al ĉiuj lernantoj de Esperanto sur kiu ajn nivelo. Prof. Wells mem eklernis la lingvon kiel 16-jarulo ĝuste kun la menciita prononca vojmontrilo sur gramofona disko.

Granda ĝojo kaj plezuro plenigas min, ĉar Fondaĵo Ivo Lapenna sukcesis eldoni serion de kvin kompaktaĵoj kun dek paroladoj de la forpasinta UEA-prezidanto kaj elstara esperantisto.

Temas pri oratorajoj prezentitaj inter la jaroj 1954 kaj 1987 — pli ol tri jardekojn kovras la menciita tempodaŭro. Nia majstro de retoriko parolas pri komunikado kaj homaj rajtoj ĝis humaneca internaciismo. Lia elokucio elstaras. Tion jam anticipe ni scias, sed reveno al ĉi tiuj diskoj daŭre inspiras kaj vokas al aktiva agado. Vere altranĝan kaj signifan kontribuan omaĝon donacis al la Esperanto-movado disĉiploj de la granda filo el la dalmata urbo Split. Varman gratulon meritas la respondeculoj de la menciita fondaĵo — sinjorino Birthe Lapenna frontloke. Ĉi tiel oni pluportas la torĉon ankaŭ al venontaj generacioj. La alta kultura valoro ĉi-kunlige estas senduba.

Iel tre aktuala nun estas la Rezolucio de Unesko en Montevideo 1954. Ekzemple, eksa UEA-prezidanto, prof. Humphrey Tonkin detale traktas ĝiajn erojn en sia nova verko *Lingvo kaj popolo* (2006). Li trovas en la afero iujn kritikindajn trajtojn. Tamen li konfesas kaj substrekas la valoron de la agado de prof. Lapenna en la urugvaja ĉefurbo antaŭ pli ol kvindek jaroj. Estas ege tikle sekvi sur la tria disko la rakontadon propravoĉan de jurista fakulo pri la streĉaj fazoj dum la Ĝenerala Konferenco de Unesko en la jam menciitaj loko kaj tempo. Ni rajtas havi diversajn opiniojn, sed ni estu honestaj en la esprimado de niaj pensoj. Volonte mi rekomendas ĉi tiun eron publikigitan en la kvindiska serio.

Reto Rossetti skribis en 1950, kiam aperis la brila libro *Retoriko*, ke “ĉiu parolado de Ivo Lapenna estas verko de fekunda menso, prezentita kun krea spontano de vera oratoro. Ĉar li amas la Internacian Lingvon, des pli saĝe li ĝin komprenas. Ni lernu de lia saĝo”.

Estas nepre necese, ke vi mem per viaj propraj oreloj ĝuu pri klara esprimado, pri prononco tre proksima al la internacia Esperanta idealo, pri eleganta, sed simpla elekto de vortprovizo, pri perfekte formulita sintakso. Ĉi tiujn erojn emfazas prof. Wells, kiu aldonas kvintesencan detalon jene: “Ivo Lapenna mem flegis sian lingvuzon, kaj per sia ekzemplo montris al aliaj kiel fari same”. Ni sekvu la vojon de li elektitan. Agrablajn momentojn ĉe viaj aŭskultiloj.

Jorma Ahomäki

**Sukcena Ondo**  
**Jubileo en Kaliningrado**  
17–19 aŭg 2007

# Telefoni al vi

de Lenke Szász

La telefono sonoris. Mi atendis kun tremanta koro vian voĉon. Tiun varman baritonon. La telefono sonoris ie, malproksime. En via ĉambro.

Mi ne havis telefonon, mi telefonis de sur la strato, el surstrata telefonejo. Mi enigis la unuan moneron en la aparaton kaj atendis. Vian voĉon, kiu vibrigis mian koron.

Okazis, ke mi trakuris stratojn por trovi nedifektitan, funkciantan aparaton, kaj mi ĝojis, se mi trovis unun. Falis la unua monero. Vi levis la aŭskultilon. La strato mergiĝis, la urbo mergiĝis, estis nur via voĉo en la tuta universo.

La moneroj falis unu post la alia en la kesteton de la malnovmoda aparato. Subite ili elĉerpiĝis. Kaj via voĉo eksilentis. Mi eliris el la telefon-niĉo. Kapturigne, sur tremantaj kruroj mi aliĝis al la preterpasantoj.



Bildo de Maria Sokolova

Kiel malfacile estis por mi ne kanti, ne saltadi sur unu piedo pro la feliĉo!

Kial? Kion vi diris? Neniam mi povis memori precize, eĉ post tri monatoj. Nur via voĉo, tiu unika, plenis mian koron kiel muziko. Kaj mi ne povis imagi la finon de tiu feliĉo...

Kiel flugis la jaroj! Pli ol jardeko pasis. Mi havas nun porteblan telefonon. Surstrate estas modernaj aparatoj.

Telefoni al vi...

En sonĝo mi ofte vagadas en via urbo. Sed tiu sonĝa urbo apenaŭ similas la vian. Estas mallumo, la tuta urbo estas en mallumo. Sed mi memoras la lokojn, kie estas publikaj telefonejoj. Kaj emocie serĉas. Mi trovas unun! Sed mankas aŭskultilo... Alian telefonon mi serĉas, mi volas telefoni... Sed mi ne memoras vian numeron. Mi forgesis ĝin.

Mi nepre volas vidi vin! Mi volas esti kun vi. Mi devos venki mian dignosenton kaj viziti vin sen esti invitita. Tion mi faros.

Mi estas antaŭ via dombloko. Batas mia koro. Sed ... la ŝtupetaro estas falinta, detruita kiel post tertremo.

Kiel supreniri sur la kvinan etaĝon?

Mi komencas grimpi sur la restaĵoj de la ŝtupoj, sur danĝeraj randoj. Mi timas.

Sed fine mi estas antaŭ via pordo. Mi frapetas, la pordo malfermiĝas. Nekonate diras malamike: li ne loĝas ĉi tie. Mi staras embarasite kaj sentas teruran mankon.

Multfoje mi havas tiun sonĝon. Ne eblas telefoni, ne eblas aŭdi vian voĉon, ne eblas esti kun vi.

Mi vekiĝas, apud mi estas portebla telefono. Antaŭ jardekoj ni eĉ ne imagis tian miraklon. Mi povas telefoni al iu ajn urbo, en iun ajn landon. Bona telefono estas, ĝi perfekte funkcias.

Sed vi ne plu estas...

Pro ĉi tiu novelo rumanino Lenke Szász ricevis laŭdan mencion en [Liro-2005](#), en la branĉo *Originala prozo*.



## Antaŭ 50 jaroj

*Antaŭ 50 jaroj, la 16an de majo 1957, naskiĝis Nikolai Lozgaĉev... Estas malfacile skribi pri proksima amiko. La amikeco kaj amaro pro la tro frua vivofino tentas min skribi tre personece. Sed lia signifo por niaj movado kaj kulturo neeviteble elvokas kliŝajn formulojn pri multtalenta poeto kaj tradukanto, pri kanzonisto kaj lingvovirtuozo, pri recenzanto kaj redaktoro, pri la unua (kaj la sola) prezidanto de Ruslanda Esperanto-Asocio kaj de la Rondo Kulturo. Malfacilas elekti. Se vi havas liajn librojn kaj kasedojn, legu kaj aŭdu mem. Aŭ, legu almenaŭ ĉi-suban fragmenton el lia membiografio kaj unu el liaj poemoj.* **AIKO**

«Mi estas klasika kampardevena ruso, kvankam laŭ la sekundaraj trajtoj mi trovas en mi mem malproksiman eĥon de tataroj. Min ĉirkaŭas la arbaraj montetoj (*parma komie*), riveroj kun komiaj nomoj: Sylva, Lysjva, Obva, Kolva, Siva, Ĉusovaja ktp. Fiero de Permo estas komiaj lignaj skulptaĵoj je evangeliaj temoj. En mia konscio de perma intelektulo ĉiam miksiĝis nordaj komioj, sudaj tataroj kaj baŝkiroj, kun rusoj, dividintaj ilin per kojno, tratabanta la vojon trans Uralon al Siberio. Ruso ne povas ne esti internaciema, eĉ pli — li estas universema, kaj lia universeco realiĝas en lia ortodoksa kristanismo, kiu subkonscie varmigas mian animon, kiun nun mi komencas konscii...»

\* \* \*

*La temploj, de la tempo mezuriloj,  
truantaj per la krucoj la ĉielon,  
montrantaj senespere foran celon,  
fieraj kapoj de la kampaniloj...*

*Mi vagas tra la urbo, sed maltrova  
sencele gapas al la stumpaj domoj...  
Sen la eterno ankaŭ vivas homoj,  
sen la ekzekutita mond' malnova...*

*Nuntempon ree freŝa vent' sieĝas, —  
post kia ajn renverso aŭ perturbo  
al siaj randoj la reven' laŭleĝas.*

*Aŭrore post la tempo-aksa kurbo  
mi vidas vian gloron, kaj mi preĝas  
je vi, senkapigita mia urbo.*

# Esperanto en muziko: ne nur en Esperantujo (3)

Ŝajnas, ke ĉi tiu rubriko estas senfina, ĉar esperanto inspiras artistojn el ĉiuj mondopartoj, kaj, kiel vi jam kons-tatis, bandoj kun la nomo *Esperanto* ja sukcesis “preskaŭ” famiĝi. Ni ne scias pri la estonteco. Eble finfine iu *Espe-ranto* fariĝos famega bando aŭ albu-mo... aŭ eĉ, kiu scias, lingvo...

*Myspace* estas vastega ĝangala informminejo, kie eblas trovi amason da interesaj muzikaj informoj... Dan-kon al Sara kaj Donald pro traduka hel-po. En la tria parto de via sendube plej ŝatata muzika serio ni prezentas *Espe-ranton*, *!Esperanton* kaj eĉ *eZperanton*.

## Vivanta sonĝo el Tirolo



La rokbandon *Esperanto* el Kuf-stein (aŭstria Tirolo) kunfondis en 2004 drumisto Bernhard Hinterndorfer kaj gitaristo Mario Edinger. Ili eksperimentis kun diversaj muzikistoj ĝis formi perfektan grupon. En 2005 kantistino Sandra Staindl aliĝis al la bando kaj alportis bonegan sonon de sia tre personeca voĉo. La kvara membro de la bando estas basisto Tobi Huber, kiu aniĝis en marto 2006. De tiam *Esperanto* estas kompleta kaj preta por rokmado! La muziko de *Esperanto* — kolora kiel la naturo kaj kiel la lingvo — ricevis multegajn influojn el roko.

*Esperanto* eldonis diskon *Living dreams*. En ĝi Sandra kantas en la germana, angla kaj hispana. Ĉu iam ankaŭ en esperanto? Nu, se iu instruos ŝin.

Por malkovri la bandon vi povas akiri la diskon *Living dreams* aŭ aŭskulti kelkajn titolojn ĉe <http://www.esperanto-band.com/> kaj <http://www.myspace.com/esperantomusic>.



## !Esperanto el limurbo

La bando *The Reeds* konsistis unue el eksaj membroj de *The Pantease*: Ruby Jade (kantistino/gitaristino) kaj Erik (drumisto). La alveno de Cassey (kantistino) kreis ion atentindan. Kun la aldonita en 2005 talento de Anthony (basisto) la bando reformiĝis kun nova sono kaj nova nomo — *!Esperanto*.

*!Esperanto* naskiĝis en El Paso, Teksaso, je duminuta distanco de Jua-rez en Meksiko. Kelkaj bandoj havas meksikajn gepatrojn kaj parencojn. Ĉi tiu urbo estas tre bunta, ĉar ĝi estas proksima al Meksiko kaj al granda armea bazo Fort Bliss kun homoj de ĉiuj usonaj ŝtatoj. Ĉirkaŭita de Franklin montaro, El Paso estas la sola urbo en Teksaso kun montaro.

Ĉi tiu diverseco kaj miksaĵo de homoj, originoj, kulturoj kaj eĉ de la natura etoso en El Paso donis al ili la ideon de la internacia lingvo esperanto, kreita de juna Zamenhof en Bjalistoko. Jes ja! El Paso tiusence povus esti komparita al la tiama Bjalistoko. Tial *!Esperanto* fariĝis la nomo de la bando.



Fotis BB Macias

Nun *!Esperanto* estas registronta sian unuan disketon (EP) kiu titoliĝos provizore *Honey Trap*. Dum ĝi prepariĝas, eblas aŭskulti demon kaj trovi pliajn novaĵojn ĉe <http://www.myspace.com/esperantorocks> kaj en la paĝo de Cassey <http://www.myspace.com/rubysfairy>.

## eZperanto el Kebekio

“Sublima, Grandioza, Brilega, Emocia...” — diras pri koncertoj de MarimuZ eĉ tiuj, kiuj ne estas fanoj de la klasika muziko.



MarimuZ (Marie-Josée Choquette) el Granby (en orienta Kebekio, Kanado) estas talenta pianistino, kiu enskribas siajn ĝojojn kaj dolorojn sur linfoliojn.

Ŝi estas juna pianprofesoro en la kebeka konservatorio Vincent d’Indy. Ŝi realigis muzikon por du dokumentaj filmoj kaj aspiras komponi kaj aranĝi muzikon por longdaŭraj filmoj...

En 2006 MarimuZ eldonis sian unuan ko-diskon *eZperanto*. “Tiu albumo instrumenta aludas pri esperanto... temas pri tiu lingvo parolata iom ĉie en la mondo”, — ŝi klarigas.

MarimuZ diras, ke ŝiaj komponaĵoj kaj muzikaj aranĝoj estas “muzika lingvaĵo universala kiun ĉiuj povas kompreni, muziko kiu transiras la landlimojn kaj promenas ĉie...” *eZperanto* estas disko kinematografia kiu vekas multnombrajn bildojn ĉe la aŭskultanto. La muziko de MarimuZ en tiu disko celas melodion por ĉiuj. Ĝi estas tutsimple unika, ununura kaj aŭtenta... Same kiel en ŝiaj koncertoj, en la disko estas miksitaj harmonie kaj akorde sub orkestrado de MarimuZ instrumentoj diversaj: piano, violono, violonalto, violonĉelo, akordiono, elektra basgitaro, drumo kaj flugelkorno (buglo).

MarimuZ revas prezenti sian muzikon ĉie en la mondo, precipe ĉe sia kuza lando — Francio...

Mendu aŭ aŭskultu kelkajn muzik-verkojn de *eZperanto* ĉe ŝia paĝo <http://www.myspace.com/marimuZ>, aŭ legu pli ĉe ŝia koncert-agentejo [http://www.agencemcmusic.com/artist/es.php?art\\_no=4](http://www.agencemcmusic.com/artist/es.php?art_no=4)

plukadis por via rubriko  
Flo!



## Literatura konkurso Liro-2007

La Ondo de Esperanto denove invitas ĉiujn dezirantojn partopreni en la tradicia literatura konkurso *Liro*.

*Liro-2007* havas kvin branĉojn:

1. Originala prozo
2. Originala poezio

3. Traduka poezio: Poemoj de Saša Ĉjornyj (Aleksandr Glikberg), okaze de lia 75a mortodato

4. Traduka prozo (el la rusa): *Anmekapua* de Anton Ĉeĥov

5. Traduka prozo (el la angla): *Eveline* de James Joyce (novelaro *Dubliners*)

En la branĉoj 1–3 oni rajtas partopreni per ne pli ol tri verkoj. Sendu kvar tajpitajn, komputile kompostitajn aŭ klare skribitajn ekzemplerojn de la konkursaĵo al la sekretario de *Liro*, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando). La konkursaĵoj devos atingi la sekretarion antaŭ 15 okt 2007.

Subskribu vian konkursaĵon per pseŭdonimo kaj aldonu slipon kun indiko de la pseŭdonimo, aŭtenta nomo kaj poŝta adreso.

Oni povas sendi la tekstojn kaj slipojn ankaŭ rete, en apartaj mesaĝoj, al la adreso [sezonoj@yahoo.com](mailto:sezonoj@yahoo.com). Oni ne rajtas sendi verkojn, kiuj estis publikigitaj aŭ premiitaj en aliaj konkursoj.

La originalajn tekstojn de la tradukendaj verkoj petu ĉe la sekretario kontraŭ afrankita koverto (por Ruslando) aŭ internacia respondkupono. La elektronikaj tekstoj estas elŝuteblaj ĉe: <http://esperanto.org/Ondo/Ind-liro.htm>.

La laŭreatoj ricevos diplomojn kaj libropremiojn. La rezulto estos anoncita je la Zamenhofa Tago 2007. La organizanto ĝis 1 jan 2010 havos la ekskluzivan rajton de la unua publikigo de la ricevitaj konkursaĵoj en *La Ondo de Esperanto* kaj elektronike. La kopirajto restas ĉe la aŭtoro, kiu konsentas cedi ĝin senpage al la organizanto en okazo de libroforma eldono.

*Sukcesojn!*

**Halina Gorecka**  
sekretario de *Liro-2007*

### Ricevitaj libroj

Gates, Ronald Cecil. *Mortiga ekskurso*. — Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo, 2006. — 111 pĝ. — [Recenzoekzemplero].

Johansson, Sten. *La krimo de Katrina*: Facila rakonto kun klarigoj de la malfacilaj vortoj kun aldono en la angla kaj japana lingvoj. — 2a eld., rev. — Toyonaka-si: Japana Esperanta Librokooperativo, 2007. — 40 pĝ. — [Donaco de JEL].

Johansson, Sten. *Katrina malfruas*: Facila rakonto kun klarigoj de la malfacilaj vortoj kun aldono en la angla kaj japana lingvoj. — 2a eld., rev. — Toyonaka-si: Japana Esperanta Librokooperativo, 2007. — 52 pĝ. — [Donaco de JEL].

Johansson, Sten. *Vojaĝo kun Katrina*: Facila rakonto kun klarigoj de la malfacilaj vortoj kun aldono en la angla kaj japana lingvoj. — 2a eld., rev. — Toyonaka-si: Japana Esperanta Librokooperativo, 2007. — 56 pĝ. — [Donaco de JEL].

Klag, Walter. *Peter Altenberg. Vivo kaj verkoj*. Unua kajero. — Vieno: eldonejo Klag, 2006. — 16 pĝ., il. — [Donaco de Walter Klag].

Nkwirikiye, Michel. *Gasuka, la aventurulo*. — Lome: Afrika Centro Esperantista, 2006. — 32 pĝ. — [Recenzoekzemplero].

Princo Henriko. *Festo de beno / Antaŭpar. Gbeglo Koffi*. — Lome: Afrika Centro Esperantista, 2006. — 24 pĝ. — [Recenzoekzemplero].

Štimec, Spomenka. *Hodler en Mostar*. — Pisa: Edistudio, 2006. — 107 pĝ., il. — [Recenzoekzemplero].

### Ricevitaj gazetoj

Aŭstria Fervojisto. 2007/1; EAB Update. 2007/37; Esperanta Finnlando. 2007/2; Esperanto. 2007/4; Internacia Fervojisto. 2007/2; KAE-Infomilo. 2007/58; Kontakto. 2007/1; La Gazeto. 2007/129; La Merkato. 2007/93; La Ondo de Esperanto. 2007/4; La Revuo Orienta. 2007/3; Monato. 2007/4; Pola Esperantisto. 2007/2; REGo. 2007/2; Scienco kaj Kulturo. 2007/2; SES Informas. 2006/5; TEJO Tutmonde. 2007/1; Tempo. 2007/1.

## Gazetoj



### Familia Esperanto

Fine de marto aperis la nova reta numero de la bulteno de Rondo *Familia* de UEA, *Familia Esperanto*. Ĝi estas kolora kaj riĉ-enhava. Kvankam ĝi celas ĉefe Esperanto-familiojn kaj gepatrojn kiuj konsideras paroli Esperanton al siaj gefiloj (aŭ genepoj), mi rekomendas ĝin al kiu ajn esperantisto kiu interesiĝas pri Esperanto kaj infanoj.

Rigardu ĝin en [http://uea.org/pdf/familia\\_esperanto\\_n-ro\\_46.pdf](http://uea.org/pdf/familia_esperanto_n-ro_46.pdf) kaj eventuale mem (re)abonu, kio helpos al ni sendi ĝian paperan version al tiuj familioj kiuj ne posedas interreton kaj komputilojn.

Aparte gravas diskonigi la novan bultenon inter ĝiaj potencialaj legantoj kaj uzantoj, ĉar ĝi aperas post dujara interrompo, kaj ĉar tiuj potencialaj legantoj ofte estas Esperanto-familioj kiuj ne estas forte ligitaj al la movado, kaj ne legas la revuon *Esperanto*, kie aperas speciala artikolo pri la novaj bulteno kaj *Rondo Familia*.

Ĉiu povas helpi, diskonigante ĝin en via loka rondo, klubo, konatoj kaj Esperanto-familioj en via lando.

**Amri Wandel**  
Prizorganto de *Rondo Familia*  
de UEA

Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov, Irek Bobrzak, Povilas Jegorovas, Eduardo Kozyra, Alen Kris kaj aliaj kunlaborantoj de *LOdE* venos al la *Sukcena Ondo*, kiu okazos 17–19 aŭg en Kaliningrado, por festi la centjarigon de Esperanto en la urbo.

*Ĉiuj legantoj estas bonvenaj!*

Ŝes respondoj venis por la februara tasko *Trovu la titolojn*. Unusolan problemon kaŭzis *Sonĝo en ruĝa buduaro*, kiun paŭsis la rusan tradukon, sed ne la presitan Esperantan. Elegantan solvon trovis nia franca legantino: “Sonĝuado en urbo ruĝa”. La ĝustaj respondoj estas: *Vojaĝo en Esperantlando*; *Kredu min, sinjorino!*; *Ruĝdoma sonĝo*; *Streĉita kordo*; *Sur sanga tero*; *La ŝtona urbo*; *La danĝera lingvo*; *Paŝoj al plena posedo*; *Kumeŭaŭa, la filo de ĝangalo*.

La ĝustajn respondojn sendis: Edmund Grimley Evans, Malkolm Jones (ambaŭ Britio), Erkki Kemppainen (Finnlando), Jackie Huberdeau (Francio), Dorota Burchardt (Pollando), Svetlana Konjašova (Ruslando). Libropremion ricevas *Jackie Huberdeau*, kiun ni kore gratulas!

## Krucvortenigmo

... <sup>2</sup> + cos <sup>2</sup> = 1							1	Sr
2	3	4	5	6	7			
			8					
9			10				11	
12			13	14				
		15						
16	17			18	19	20		
21	22	23	24					
		25		26				
27				28				
			29	30	31	32	33	
34	35	36			37			
						38		
39	40			41				
42				43				

Solvinte la krucenigmon, el la verde markitaj kvadratoj formu frazon, kiun sendu kiel solvon. Krome, indiku kiom da ĉapelitaj literoj troveblas en la krucenigmo. Vian respondon sendu al la redakcio de *La Ondo rete* aŭ poŝte antaŭ la 15a de junio 2007.

1. Loĝanto de Apenina duoninsulo (R); 2. Mezuro de volumeno; 3. Nia planedo; 4. Gutoj da vaporo, kiuj dum nokto fluidiĝas sur la vegetaĵojn aŭ sur la teron (R); 5. Tinto; 6. Lako (R); 7. Demanda vorto; 8. Helflava materialo, kiun eligas abeloj por konstrui sian ĉelaron; 9. Inerta gaso (R); 10. Plej bona, selektita parto aŭ ekzemplero (R); 11. Lirika poemo (R); 12. Besto, kiu vintre dormas; 13. Biblia ĝardeno, loĝloko de Adamo kaj Eva; 14. Grupo; 15. Speco de prunoj (R); 16. Ludkarto kun nur unu punkto; 17. Estrado (R); 18. Prefikso, signifanta “estinta”; 19. Arĝentblanka alkala metalo (R); 20. Delfeno (R); 21. Kaldrono ridas pri ..., kaj mem estas kota; 22. Floro; 23. Spirita atmosfero (R); 24. Bruo potenca, nula ...; 25. Unuo de elektra rezistanco; 26. Ĉefurbo de nordorienta afrika lando (R); 27. Kvarangulo; 28. disponebla provizaĵo de varoj (R); 29. Nura; 30. Instrumento por botisto (R); 31. Membro; 32. Balkono estas ... de la unua rendezuo de Romeo kaj Julieta; 33. Sankta bildo (R); 34. Latinalfabeta litero, simbolo de nekonata kvanto en algebro; 35. Hejma musĉasanta mambesto (R); 36. Bonfarto (R); 37. Persona pronomo (horizontale); La plej longa rivero (R) (vertikale); 38. Numeralo (horizontale); Ovo kokonon ... instruas (vertikale); 39. Kolonja akvo (R); 40. Irvojo en ĝardeno aŭ parko inter du vicoj da arboj (R); 41. Kolora fluaĵo por skribi; 42. Kemia substanco C<sub>8</sub>H<sub>18</sub> (R); 43. Signo de Zodiako (R).

Kompilis **Viktor Alikin**

## SPRITAJ SPLITOJ KAJ PRESKERAROJ el la kolekto de reduktoro

### Masklo ŝtopus, aŭ: gape kaj mire

...nur maskla pronomo, ne neŭtrala, ŝtopus efektivan gapon en la esprimkapablo de E-o. (komento de Cyril Brosch je 2007-02-27 al “Post Ido kaj iĉo furoras naismo”, <http://www.liberafolio.org/2007/reformismo>)

### Ŝtopitaj pioniroj en senseksejo

El arĥivskatolo, 1906, Neŭtra Moresneto. La pioniroj, plenŝtopitaj de la reganta idealismo... (*Esperanto en Marche*, 2007, №1, pĝ. 13; rimarkis Ionel Oneț)

### Ĉu mare aŭ ronĝe?

Novaj Familia Esperanto kaj Rodo Familia (Amri Wandel pri du bultenoj, <http://groups.yahoo.com/group/komitato-de-uea/message/3055>, 12 marto; rimarkis Kalle Kniiwilä)

### Wandel nek komisararo nek komizo

Amri Wandel, komisiisto de Rondo Familia... (Trarigarado de la Esperanto-Gazetaro, 10 apr 2007, <http://www.polskieradio.pl/eo/dokument.aspx?iid=50839>)

### In-ĝenijaj studoj?

Mi studas nun en Barcelono pri inĝeniero, kaj interesiĝas pri kulturoj de popoloj... (*Esperanto aktuell*, 2006, №1, pĝ. 20; rimarkis Ionel Oneț)

### Youtube, Esperanta pedofilia?

Ni amoru unu la aliajn, infanoj (Titolo de hungara kanzono laŭ <http://www.youtube.com/watch?v=wG14GcuUvDk>; rimarkis Karles Berga en <http://labekbotelo.blogspot.com/2007/03/amor-amor.html>)

### Kalocsay la katastristo

Kalocsay... uzis citilon anstataŭ cirkumfleksio, la rondajn kampojn li anstataŭgis per / signo. (Ada Csiszár, antaŭparolo al *Selektitaj leteroj de Kálmán Kalocsay*, Budapeŝt, 2006; rimarkis Ionel Oneț)

### Transtomba komprenemo

[450 korneo-transplantoj] eblis pro la pli granda nombro da donantoj, danke al sentemo de familianoj de mortintoj kaj al ties komprenemo pri la valoro de tiu sinteno... (dis-sendolisto de Esperanto@ain.cu, 16 mar 2007)

Plukis **István Ertl**

## Ridu kun poloj

En ŝakturniro 75-jara Petro venkis 76-jaran Paŭlon. Kiam oni demandis lin pri la rezulto, li respondis:

— La juneco venkis!

Ege ebria viro diras al taksioŝoforo:

— Ĉu vi estas libera?

— Jes!

— Nu, ĉu ni dancu?

— Iu ŝtelis ĉiujn miajn kreditkartojn, sed mi ne volas informi pri tio policon, ĉar la ŝtelinto elspezas malpli multe ol mia edzino.

— Kio okazos se oni trinkos tro multe da vodko?

— Estos postmorgaŭ.

Tradukis esperantistoj el Olsztyn (Pollando)

## La dua filmkonkurso

**Triesta E-Asocio lanĉas la duan internacian konkurson pri kurtfilmoj, je libervola temo, ital- kaj/aŭ Esperantolingvaj, aŭ alilingvaj kun surskribaĵoj en la itala aŭ Esperanto. La filmoj povas esti ankaŭ senparolaj.**

La konkursoverko ne estu jam prezentita en aliaj similaj aranĝoj, kaj la aŭtoro subskribu oficialan deklaron tiusence. La kurtfilmo devas esti en formo de DVD aŭ VHS kaj ne superu 15-minutan daŭron. Ĝi ne estos redonita.

La aŭtoro sendu poŝte sian verkon ĝis la 15a de decembro 2007, al Esperanto Trieste ☒ C.P. 601 Trieste Centro, IT-34101 Trieste, Italio.

Krome estu provizitaj la jenaj informoj:

- vivpriskribo kun aldonita malgranda foto de la aŭtoro;
- mallonga resumo de la kurtfilmo, kelkaj fotoj, ties titolo kaj ĝenro, kiu estos elektita inter la sekvaj: kultura-didaktika-dokumenta, komika, komedia, drama, detektiva, fabela, folkloro, muzika, filozofia;

- nomoj de la roluloj kaj de la aliaj aŭtoroj aŭ personoj iel kunlaborintaj en la filma realigado.

Estas absolute malpermesataj pornofilmoj kaj filmoj kun perfortaj scenoj-temoj.

Ĉiuj alvenintaj verkoj estos publike prezentataj okaze de la Semajno de Internacia Amikeco (18–25 feb 2008) dum kelkaj vesperoj je senpaga eniro. La ĉeestonta publiko voĉdonos la plej bonajn verkojn kaj al tiu voĉdono, sumiĝos tiu de 5-persona ĵurio.

La filmoj, klasifikiĝintaj inter la unuaj tri, ricevos premion en formo de pokalo, plato, libroj, krome per projekciado de la verko en Interreto kaj similaj kinejaj ĉenoj. La decidoj estas nepriapelacieblaj.

Pliaj informoj ĉe: [nored@tiscalinet.it](mailto:nored@tiscalinet.it) kaj ĉe: [www.blog.ialweb.it/esperantotrieste/](http://www.blog.ialweb.it/esperantotrieste/)

## Esperanto kunligas nin

**26 jul 2007 estos la 120a datreveno de la naskiĝo de Esperanto. Omaĝe al ĝi estas lanĉita la rubriko Esperanto kunligas nin en la TTT-ejo de El Popola Ĉinio.**

La kontribuado povas esti en ajnaj stilo kaj formo, temante pri Esperanto-aktivado, pri viaj kontaktoj kun ĉinaj samideanoj, pri vojaĝo en Ĉinio, pri impresoj pri Ĉinio kaj pri EPĈ... Estos tre bonvenaj fotoj pri diversaj aktivadoj kaj portreto de la aŭtoro. Premioj estos aljuĝitaj, kaj la gajnintoj ricevos Esperanto-librojn aŭ paperan *Espero.com.cn*. Ĉiu kontribuinto ricevos donaceton.

Bv. sendi viajn kontribuadojn antaŭ 31 jul 2007.

☒ El Popola Ĉinio, P.O. Kesto 77, CN-100037, Pekino, Ĉinio; ✉ [elpc@china.com](mailto:elpc@china.com), [bluachiolo@163.com](mailto:bluachiolo@163.com)

**Internacia Esperanto-Konferenco  
en Pazarĝik, Bulgario, 14a-20a de julio**

*Mitoj kaj legendoj*

postkonferencaj ekskursoj al Plovdiv, Baĉkovo, Kazanlak, Karlovo

**Kontaktaj:** Georgi Mihalkov, 1229 Sofio, ĵ. k. "Nadejda" V, bl. 529, vh. A et. 9 ap. 33, Bulgario

☎ (02)934-42-55 ✉ [modest@abv.bg](mailto:modest@abv.bg)

Eric Laubacher, 1 rue Bougainville, FR-78180 Montigny-Bx.

☎ +33 1 30 96 67 91 ✉ [kasisto@osiek.org](mailto:kasisto@osiek.org)

## FOTORAPORTOJ



11 apr 2007 en Vieno 23 gelernantoj de la gimnazio Diefenbachgasse 19 referis dum tri horoj pri lingvoj, ankaŭ pri Esperanto. Poste okazis vizito de la Internacia Esperanto-Muzeo (vidu supre) kaj de la Globusa Muzeo en Vieno. (Fotis Walter Klag)



Post la inaŭguro de la Esperanto-memorŝtono *Israelo* (vd. pĝ. 9), d-ro Amri Wandel vizitis, helpe de esperantistoj, kelkajn polajn urbojn. En Pelplino post kantado kaj dancado de la junulara folklor-ensemblo *Modraki* la artistoj kaj esperantistoj faris memorfoton. (Fotis d-ino Encarna Teruel)



**Festivalo Arta Lumo** okazos ĉi-somere en la moderna muzikcentro de Kuopio, kiu apartenas al elito de finlandaj koncert- kaj kongres-ejoj kun pli ol 300 aranĝoj kaj 100-150 mil vizitantoj ĉiujare. La ĉefa koncertejo havas 1064 sidlokojn. En la muzikcentro konvene aranĝeblas ekspozicioj, prelegoj, teatro, diskoteko k.a. (Anna Ritamäki)



Post naŭ sukcesaj konkursoj (1998–2006) la redakcio de *La Ondo de Esperanto* invitas al partopreno en la deka Internacia Fotokonkurso. Rajtas partopreni ĉiu fotemulo amatora aŭ profesia, sendepende de la loĝlando kaj lingvokono. Unu persono rajtas partopreni per maksimume kvin fotoj. La minimuma formato estas 15×20 cm. Fotoj povas esti koloraj aŭ nigra-blankaj, vertikalaj, horizontalaj kaj aliformataj. Fotoj senditaj elektronike ne estas akceptataj.

La konkursaj fotoj devas esti senditaj al la sekretario de la konkurso, Halina Gorecka (RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando). La fotoj devos atingi la sekretarion de la konkurso antaŭ la 1a de decembro 2007.

La konkursaĵoj devas esti subskribitaj per pseŭdonimo. En aparta koverto kunsendata devas esti slipo kun la pseŭdonimo, aŭtenta nomo, poŝta adreso kaj retadreso (se estas) de la aŭtoro. Oni povas aldoni titolon aŭ klarigan noton al la fotoj, sed tio ne estas deviga. En la konkurso ne rajtas partopreni fotoj jam premiitaj aŭ publikigitaj.

Juĝkomisiono aljuĝos premiojn al la laŭreatoj:

1. 50 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto* en 2008.
2. 25 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto* en 2008.
3. abono de *La Ondo de Esperanto* en 2008.

Speciala premio (50 eŭroj kaj abono de *La Ondo de Esperanto*) por la plej bona foto pri la temo *Festoj*.

Ĉiu premiito ricevos diplomon. La rezulto estos anoncita en *La Ondo de Esperanto*. La organizanto de la konkurso havos ĝis la 31a de decembro 2009 ekskluzivan rajton uzi la ricevitajn fotojn en papera kaj elektronika formo kaj en ekspozicioj. Poste la publikigo-raĵton havos kaj la organizanto kaj la aŭtoroj.

*Pro la supra foto Maurizio Bresnik laŭreatiĝis en la naŭa fotokonkurso*